HUNGARA VIVO

2
1984
13,-Ft

NI ENTREPRENU KUNE!

Se entrepreni ion... **BUBIV**

Se instalado de hotelo... **BUBIV**



Ni entreprenas kompletan fabrikadon kaj surlokan muntadon de instalaĵoj por hotelĉambroj kaj komuncelaj ejoj, enlande kaj eksterlande

BUBIV
BUDAPEST, IV. Lórántffy Zs. u. 15/b.

bubiv

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u.6. H-1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193. H-1368
Aperas dumonate
XXIVa jaro, 1984 n-ro 2
(114)

ENHAVO

Szilágyi, F.: La pilgrimanta scienculo (E. *Fenyvesi*) 42
László, I.: Nova leĝo pri voĉdonrajto en Hungario 45
Deme, L.: La estonto de lingvoj, la lingvo de la estonto 46
SZÁMALK – Entrepreno pri Apliko de Komputekniko 48
Matveev, V.: Grava dato en la historio de Esperanto 51
László, I.: Szilárd Bálint 75-jara 52
Szenes, I.: Hungara „Malfermita Letero" al Margaret Thatcher 53
Benczik, V.: Pri la libroeldonado de Hungara Esperanto-Asocio 54
Esperanta libroprodukto 55
Ses libroj de István Nemere 56
József, A.: Du poemoj (*I.Szabó*) 58
Panoramo 60
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 63
Csányi, S-ne: Buĉistaj instalaĵoj de la Entrepreno MEZŐGÉP en Monor *(E.F.)* 64
De kabloj ĝis akumulatoroj *(E.F.)* 66
Originala poezio (Z.*Heide*, A. de' *Giorgi*, I. *Szabó)* 68
Mihalkov, G.: La poezia mondo de la Esperantaj poetinoj 69
Interkonsento pri kunlaboro inter HNA kaj HEA 72
Paĝo de komencantoj 73
Recenzoj de V. *Benczik*, E. *Fenyvesi*, J. *Varga* 74
Por la atento de sovetaj esperantistoj! 76
Fenyvesi, E.: Gaja paĝo 77
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 79
Leterkesto, Korespondi deziras 80

Sur la frontpaĝo: La librovendejo de HEA (Foto de Z. Fejer)

FOTO EL LA LIBROSERVO...

de HEA dekoras la frontpaĝon de tiu ĉi numero de HV, kvankam nun ne estas decembro, tamen, ni supozas, paroli pri libroj ĉiam estas aktuale. Ni raportas en aparta artikolo pri la eldona agado de Hungara Esperanto-Asocio, inkluzive pri ĝiaj ĉijaraj planoj. Ni kredas, ke la ampleksoj de tiu agado estas vere atentindaj, kaj ni esperas, ke niaj legantoj donos al ĝi la indan atenton. Krom prezenti la ĝeneralan agadon, ni prezentas ankaŭ la ĝisnunajn ses originalajn prozajn verkojn (unu novelaron kaj kvin romanojn) de István *Nemere*, kies nomo jam ne sonas fremde al niaj legantoj. Verŝajne ni ne eraras multe, se ni diras, ke li estas unu el niaj plej elstaraj prozistoj.

Estas io nova ankaŭ por komencantoj, kiuj ĵus finis la elementan kurson: «Amuzaj historioj en Esperanto» de Albert *Lienhardt*, el kiu libro oni povas legi ĉerpaĵojn sur la reaperanta «Paĝo de komencantoj».

Literaturamantoj ne povas plendi pri manko de poemoj: aperas la spirhaltige bela longa ampoemo «Odo» de la hungara poeto Attila *József* (1905-1937), kaj «Paĝo de originala poezio», kiu fariĝis preskaŭ konstanta rubriko en nia revuo. «Kiom da veraj Esperantaj poetinoj ni havas? » – lanĉas la demandon en sia eseo Georgi *Mihalkov*, alfrontante la Esperantan poezion el iom nekutima vidpunkto.

Sándor *Kőrösi Csoma* (1784-1842) estis elstara hungara scienculo, kompilinto de la unua Tibeta-Angla vortaro – pri lia vivo ĉijare aperos eĉ libro en Esperanto. La aŭtoro de tiu ĉi libro nun prezentas la grandan scienculon per artikolo al la legantoj de HV.

Profesoro László *Deme* ekzamenas la demandon, ĉu la marksisma teorio havas pretan koncepton pri la lingvo de la estonto? V.V. *Matvejev* el Vladivostok pritraktas la fruan historion de Esperanto, nome, kiam fondiĝis la unua esperantista societo en Azio?

Imre *Szenes*, ĉefredaktoro de la hungarlingva revuo de HEA «Világ és Nyelv» (Mondo kaj Lingvo), raportas pri tio, kiel estis eluzita la hungarlanda vizito de la brita ĉefministro Margaret *Thatcher* por informi ŝin pri la atingoj de Esperanto.

Se eblas kredi al presistoj, tiu ĉi numero atingos la Eŭropajn legantojn komence de majo.

Ferenc Szilágyi

La pilgrimanta scienculo

Antaŭ jarcento, en 1885, brita oficisto kaj ĵurnalisto William Wilson *Hunter* – kiun cetere interesis la lingvistiko – publikigis artikolojn kun titolo *„La pilgrimanta scienculo"* en la revuo *„The Pioneer Mail"* eldonita en Allahabad.

La unua artikolo tiel komenciĝis: „En novembro de 1824 mizere vestita Eŭropano descendis sur la deklivo de la Interna-Himalajo al la brita limgardejo Sabatu. Kvankam li vestis sin kiel la indiĝenoj per sakŝtofa mantelo, li prezentis sin Aŭstria civitano el Transilvanio, kaj lingvoscienculo, kiu dum la pasintaj kvin jaroj vojaĝis el Hungario, plejofte perpiede, al Mez-Azio... Tiu kompatinda pilgrimira scienculo estis Sándor *Kőrösi Csoma,* unu el la grandaj, originalaj kreantoj de nia jarcento. Kiel lernanto, antaŭ studentiĝo en universitato, li faris kun du aliaj lernantoj voton, ke ili penetros en Mez-Azion por malkovri la originon de sia nacio. El la tri, sole Csoma tenis la voton... La plenumo de lia vivo estis, ke li malfermis novan, vas-

Sándor Kőrösi Csoma. (Lignogravuraĵo de Béla Gy. Szabó)



La Tibeta Gramatiko, unua eldono de 1834, (kun Tibetlingva enskribo)

tan teritorion por la scienco. Por ekkoni Himalajon kaj esplori por Eŭropo tion, kio troviĝas malantaŭ ĝi, Csoma sola plenumis multe pli, ol la armeo de generalo Ochterlony." La ĵurnalisto precize kaptis do la sciencan valoron de la admirinda pilgrimado.

Proksime al la limo de Sikimo, ĉe piedo de Himalajo, en Darĵiling videblas la hinda-stila tombmonumento de Csoma, sur kiu – apud la originala angla tabulo – eblas legi ankaŭ tabulon de la Hungara Scienca Akademio:

KŐRÖSI CSOMA SÁNDOR
HUNGARA SCIENCULO 1784-1842
RIPOZAS ĈI TIE.
POR LA MONDO EMINENTULO
FONDINTA LA ORIENTALAN
LINGVISTIKON,
POR NI, SAMPATRUJANOJ,
ETERNA MODELO
DE PATRUJAMO KAJ SCIENCA
SINOFERO.
SERĈANTE LA LULILON DE SIA
NACIO
LI TROVIS SIAN TOMBON – KAJ
LA SENMORTECON.

La pilgrimantan scienculon la nacia romantiko igis ekvojaĝi al la longega vojo, por fine atingi la homan universalecon. Sed li fiere presigis sur la titolpaĝon de sia Vortaro Tibeta-Angla (kiu iĝis ŝlosilo de la Tibetistiko): „Verkis Sándor Kőrösi Csoma, Sikulo-hungaro el Transilvanio." Ĉar en lia personeco kunfandiĝis hungareco kaj homaraneco, samkiel en *Petőfi,* poeto de la „Mondlibero" kaj de la „Nacia kanto"; aŭ en Béla *Bartók,* kiu esploris kaj la hungarajn popolkantojn, kaj la rumanajn, slovakajn, turkajn, arabajn, levante ilin al universala nivelo. Tiamaniere ili iĝis parencaj: ĉar ne nur Eŭropa, sed ankaŭ „Eŭrazia" animo vivis en ili, konforme al la Eŭropaj kaj Aziaj heredaĵoj de la hungara kulturo.

Pasis 125 jaroj post la morto de la „pilgrimanta scienculo", kiam en 1967 unuafoje mi veturis al Hindio por pilgrimi kiel sampatrujano al la lokoj kie li laboris. Sed jam ne perpiede kiel li, nek en Armena kaftano. De Danubo ĝis Gango la distanco eĉ nun-



Nova eldono de la Vortaro Tibeta-Angla (Nov-Delhio, 1973)

tempe ne estas pli mallonga ol antaŭ jarcento; depost tiam nur la tempo akceliĝis. Jam estis malantaŭ ni Moskvo, Delhio, Agra, ankaŭ la sankta urbo de la hindoj, Benares (Varanasi), kvankam 8000 km estas vere ega distanco. Sed se mi kalkulas sole la horojn de la flugado, la veturo daŭris nur iom pli ol duontagon!

La iama pilgrimanto veturis *pli ol du jarojn,* ĝis li sukcesis el Transilvanio perpiede, surdorse de muloj, per velbarkoj kaj flosoj, marŝante kun kamelkaravanoj finfine atingi Hindion. Kiam li ekveturis, neniel li imagis, ke tiu giganta lando prezentos la kadron por liaj esploroj, nek ke anstataŭ la serĉata prahungara patrujo, en ĉi tiu lando li akiros sian sciencan gloron.

De Istanbulo trairinte la grekan teron li atingis la Mediteranean Maron por ŝipveturi al Aleksandrio, kaj de tie al Latakio, havenurbo en Sirio. Kun karavanoj iom post iom li pene atingis Bagdadon, pli poste Teheranon – ĉion ĉi preskaŭ sen mono, kun sola ŝultra sako; ĉar li ne akceptis subtenon de hungaroj, por eviti riproĉon se lia entrepreno fiaskos. El Teherano li intencis iri al orienta Turkestano, kaj tra Buĥara por trafi Mez-Azion – sed militaj perturboj baris tiun direkton. Li returniĝis kaj ekiris al Hindio, por trovi vojon tra la pasejoj de Himalajo al sia originala celo.

Ĉe la limo de Kaŝmiro okazis por li sortoturna, decida renkonto kun brita komisiito, en junio de 1882. William *Moorcroft* instigis la mizeriĝintan migrulon akcepti la taskon pri Tibetaj esploroj. Csoma tiutempe proksimiĝis al sia 40a jaro: li kaptis la ideon studi provizore la Tibetan lingvon, ĉar li forte esperis trovi indikojn en Tibetaj libroj pri la hungara prahistorio. Tamen la korekta plenumado de tiu tasko postulis pli ol kvin jarojn, kiujn li pasigis inter Tibetanoj en monaĥejoj de Ladak, provinco en Kaŝmiro. „Inter teruraj cirkonstancoj, kiuj aliulojn pelus en plenan malesperon" – skribis iama vizitanto – li heroe kaj sinofere preparis la vortaron kaj gramatikon de la Tibeta lingvo, zorge studante centojn da Tibetaj kodeksoj.

Kiam fine de 1830 la verko ŝajnis jam kompleta, li veturis tra Delhio, Agra, Varanasi al la malproksima Kalkato, urbego ĉe la Bengala Golfo. „Sojlo al diino Kali" – tion signifas la nomo de la urbego, kie Csoma finverkis la volumojn de la „Vortaro Tibeta–Angla" kaj „Tibeta Gramatiko", kaj kie li daŭrigis poste dum pli ol jardeko sian formike diligentan sciencan laboron. La publikigo de tiuj fundamentaj lingvistikaj verkoj vekis furoron en la sciencaj medioj. Sed pri tio mi parolos poste.

De nia hotelo rekte kondukis strateto al la iama Registara Palaco, ja, en Kalkato estis la rezidejo de la Brit-Hindia Imperio ĝis 1912, kiam Delhio transprenis tiun altan rolon. De tiu Palaco tra grandioza parko ni promenis al avenuo de vendejoj. Kiel en la tempo de Csoma, sur la verda herbejo dise ripozis brunhaŭtaj Bengaloj; la klakadanta ruĝa tramo antaŭ jarcento certe ne kuris, sed ŝvitanta tiristo de rikiŝo ankaŭ tiam kuris kun sunombrelaj sinjorinoj... Preterante la Nacian Muzeon, trezorejon de la majstregaj Hindiaj artaĵoj, ni atingis la palacon de la Azia Societo, kontraŭ la Parkstrato. Tie loĝis kaj laboris Kőrösi Csoma.

Verdas ankoraŭ la ŝtona barilo pro la grimpaj plantoj, iom pli hele ankoraŭ la fenestraj ĵaluzioj – konataj el bildoj de biografioj, verkitaj pri la granda scienculo. Ĝis 1842 li vivis tie kvazaŭ ermito de la orientalistiko, „profunde meditante kaj silente por si ridetante, samkiel la bramanoj, dungitaj de la Societo, klinantaj sin super skribotabulon dum kopiado de Sanskritaj tekstoj." Tiel vidis lin eminenta franca orientalisto, Théodore *Pavie,* kiu mire menciis pri la loĝĉambro, preskaŭ monaĥeja ĉelo, kaj pri liaj koridoraj promenetoj, mallongaj, por ne perdi pli da tempo.

En la granda rondkoridoro, kie li tiomfoje promenadis vespere plejofte sole, nun videblas lia busto inter la marmorkolonoj. Sub ĝi ni legis la

La iama palaco de la Azia Societo en Kalkato

epiteton: „Pioniro de la Tibetaj Studoj", kaj dum amika solenaĵo ni almetis florkronojn kaj citis entuziasmajn vortojn de la granda franca esploristo, Barthelémy *Saint-Hilaire* de antaŭ cent jaroj: „La nomo de Sándor Kőrösi Csoma meritas eternigon eĉ pro du motivoj. La filologio devos neniam forgesi, ke Csoma faris eksterordinaran malkovron, prezentante por la scienco la lingvon kaj literaturon de Tibeto. Kaj tion li plenumis per tiom da persisto, sinofero kaj akcepto de la plej primitivaj mankoj, kiel neniu alia... Hungario rajtas fieri pri sia eksterordinara filo."

Ni vizitis la presejon de la Baptista Misio, kie unuafoje estis presitaj liaj gravegaj verkoj. Unuafoje, ĉar poste aperis pluraj kopi-eldonaĵoj: la Gramatiko en Ĉinujo (1939), la Vortaro en Delhio (1973), kaj fragmentoj aliloke; do pruviĝis la opinio de la granda itala Tibetisto, Giuseppe *Tucci,* laŭ kiu neniu sukcesis post Csoma publikigi pli ampleksan aŭ pli bonan.

La granda respekto antaŭ la Vortaro montriĝis foje en kuriozaj situacioj. Tia estis la historieto de la japana profesoro Kavaguĉi *Yekai,* kiam laŭ la entuziasmiga ekzemplo de Csoma, en 1896 li volis viziti la misteran Tibeton. Antaŭe li pilgrimis al la tombo de Csoma en Darĵilingo, kaj tie atendis longe-longe la vizon de Nepalo. Foje urĝante la vizon li vizitis la konzulon de Nepalo, kiu surprizite rimarkis ĉe la japano la Tibetan Vortaron de „Csoma Sikulo-hungaro" kiel presite; kaj interŝanĝe, la Vortaron kontraŭ la vizo, la profesoro rajtis eniri Nepalon...

Krom la jam menciitaj verkoj, Csoma produktis ankaŭ alian gravan libron, kiu tamen aperis sepdek jarojn post lia morto: la Sanskrita–Tibeta budhisma terminaro, la *Mahavyutpatti* (t.e. Granda Etimologio) ricevis de Csoma precizajn anglajn ekvivalentojn, klarigojn. En 1910 eldonis ĝin finfine en Kalkato E.D. *Ross,* kiu cetere pro respekto antaŭ Csoma lernis la hungaran lingvon. (Post tri jardekoj tiu ĉi verko estis denove eldonita pro postulo de la fakuloj.)

Csoma fervore preparis sin por veturi al la „malpermesita urbo", al



156. Csomas Haus in Kanam. (S. 363.)
Skizzen des Verfassers.

Loĝejo de Csoma en Himalajo (desegno de Sven Hedin)

La busto de Kőrösi Csoma en la palaco de la Azia Societo (de B. Holló)

Lasso. Dum tiu vojo okazis lia morto en Darĵilingo, la 11-an de aprilo 1842. La tiea tombmonumento iĝis vera pilgrimejo de la scienca mondo (en Japanio oni deklaris lin „Bodisatvo", t.e. budhisma sanktulo plej altgrada.) Sur la jam menciita tomba tabulo staras anglalingvaj vortoj de la Azia Societo en Bengalio: „dum jaroj kiujn li pasigis en situacioj tiel malagrablaj, kiajn homo apenaŭ iam suferis, post persista penado por la scienco li verkis la vortaron kaj gramatikon de la Tibeta lingvo: tio estas lia plej inda monumento."

Lia vojo – eĉ tiel interrompita – estas tamen kompleta: heroo de la scienco, li malkovris ion, pli grandiozan ol kion li originale serĉis. Li sukcesis prezenti nekonatan sferon de la homa spirito: la Tibetan lingvon kaj la abundan religian kaj sciencan literaturon de la norda budhismo, postrestintan en monaĥejoj de Himalajo.

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

La tombo en Darĵilingo

Nova leĝo pri voĉdonrajto en Hungario

La fina sesio de la Budapeŝta Parlamento en decembro 1983 aprobis novan leĝon pri voĉdonrajto.

La elekta sistemo de la deputitoj kaj tiu de la konsilantoj (urbaj, vilaĝaj kaj en Budapeŝto distriktaj) en Hungario formiĝis laŭgrade, konforme al la evoluo de la socia, ŝtata vivo. La principojn kaj fundamentajn regulojn enhavas la Konstitucio. Tiuj dekretoj de la Konstitucio certigas firman fundamenton por la detala reguligo de la voĉdonrajto. Laŭ tiuj dekretoj ekzistas aktiva rajto, koncerne tiujn, kiuj ĝenerale rajtas partopreni en la voĉdonado, kaj pasiva rajto, kiu difinas: kiuj estas elekteblaj inter la membrojn de la reprezentaj organoj.

La demokratia voĉdonrajto en Hungario efektiviĝas per ĝenerala, egala, senpera kaj sekreta baloto.

La konstituciaj principoj kaj reguloj de la elekta sistemo – ankaŭ ĝis nun – montriĝis konformaj kaj konvene servis la sociajn celojn de la lando. Tamen ekzistas kelkaj faktoroj, kiuj de nun necesigas antaŭenpaŝon. Dum la forpasintaj jardekoj fortiĝis la nacia unueco kaj la konstruado de la evoluinta socialismo ĉiam pli pretendas la pluevoluigon de la socialisma demokratio.

Ĉi tiuj postuloj neprokrasteble pretendas ankaŭ la pluevoluigon de la elekta sistemo, por ke tiu rezultigu la plivastigon de la civitanaj rajtoj, fortigu la rolon de la popolreprezentaj organoj, krome por plisimpligi la preparon kaj aranĝon de la elektoj.

La plej fundamenta, nova dekreto de la leĝo estas la deviga plurnombra kandidatigo de la deputitoj (konsilantoj). Kvankam ties ebleco ankaŭ ĝis nun estis certigita, en la praktiko tio efektiviĝis ne ĉiam. Pro tio fariĝis necese per leĝo certigi la plurnombran kandidatigon. La nova leĝo kalkulas pri tio, ke post la enkonduko de la deviga plurnombra kandidatigo en multaj balotaj distriktoj ankaŭ la neelektitaj kandidatoj povas ricevi konsiderindan parton de la voĉdonoj. Pro tio la leĝo preskribas, ke tiuj kandidatoj – havante almenaŭ la kvaronon de la voĉoj – fariĝu anstataŭaj deputitoj.

Grava parto de la nova leĝo estas la sistemo de la individua balota distrikto. Tiun praktikon ĝisnunan daŭrigi ankaŭ estonte estas laŭcele. Tamen laŭ la spertoj de la elektoj estas necese, ke en la plej altaj organoj de la popolreprezento nepre ĉeestu la gvidantoj de la politika, socia vivo, krome la plej konataj personoj de la scienco, kulturo kaj eklezioj. Do estas necese, ke pri ilia persono ĉiuj civitanoj de la lando deklaru opinion. Konforme al tiuj vidpunktoj la leĝo enkondukas la „tutlandan elektan liston" ĉe la elekto de la parlamentaj deputitoj. Laŭ tio ĉ. dek procentojn de la parlamentaj deputitoj oni kandidatigas en la tutlanda listo.

La voĉdonrajto laŭleĝe apartenas al ĉiuj plenkreskintaj – pli ol 18-jaraj – civitanoj de la Hungara Popolrespubliko. De nun la rondo de la ekskluziveblaj civitanoj estas iom pli malvasta. Nome nur tiuj estas ekskluziveblaj, kiuj mense malsanas, resp. kies ekskluzivon preskribas tribunala verdikto, kaj tiuj, kiuj sian punon plenumas en malliberejo.

La nova leĝo faras nenian diferencon inter la kondiĉoj de la aktiva kaj pasiva voĉdonrajtoj. Sekve ĉiuj civitanoj, kiuj havas voĉdonrajton, samtempe estas ankaŭ elekteblaj.

Laŭ la nova reguligo, la bazo de la elekta sistemo ankaŭ estonte restos la elekto en la loka balota distrikto. Tamen la enkonduko de la tutlanda elekta listo estas unu el la plej gravaj novaĵoj.

Pro la deviga plurnombra kandidatigo konsiderinde kreskis la rolo de la Patriota Popolfronto, ĉar oni devas kandidatigi minimume du personojn. Konforme al tio estas devige aranĝi almenaŭ du kandidatigajn kunvenojn.

Laŭ la antaŭa regulo dum la daŭro de la voĉdonado estis malpermesita la publika konsumado de alkoholaĵo. Tiu malpermeso – pro ĝia malaktualiĝo – nuntempe estas preterlasita.

Okazis reguligo ankaŭ pri tio, kiuj rajtos baloti en sia hejmo. La nova leĝo plivastigis la rondon de tiuj personoj. De nun la balotprenanta komisiono vizitas ne nur la kuŝantajn malsanulojn, sed ĉiujn, kiuj pro maljuneco aŭ pro handikapiteco ne povas forlasi sian hejmon.

En ĉiuj socialismaj landoj – ankaŭ en Hungario – al la koncepto de la voĉdonrajto apartenas, ke la elektitaj deputitoj (konsilantoj) devas regule raporti por siaj elektintoj pri sia laboro. Tiel same la elektintoj havas rajton la deputitojn iam ajn – en kadro de difinita procedo – revoki kaj per tio ĉesigi ilian mandaton.

István *László*

La Parlamentejo

D-ro László Deme

La estonto de lingvoj,

La gepatraj lingvoj kiel komunikrimedoj bone servas la koheriĝon «interne» en la komunumoj, ebligas por la individuoj la atingon de la plej alta nivelo de scioj akirita de la tuta komunumo, tamen «ekster» la komunumo ili estas nekapablaj, ne ebligas akiron de scioj, eĉ inverse, malhelpas ties interŝanĝon. Sekve nuntempe la persono, ĉefe se devena el «malgranda» nacio, devas scipovi plurajn (kaj principe ĉiam pli plurajn) lingvojn por leviĝi pli alten ol la horizonto de sia lando-nacio.

Pli alten, sed ankoraŭ ne al la horizonto de «homaro». Ja «mondlingvo» ne ekzistas, nur «mondlingvoj», en pluralo. Kaj tiuj «mondlingvoj» ĉiuj estas naciaj lingvoj; portantoj, respegulantoj sekve ankaŭ disvastigantoj de pensmaniero kaj sciaro de iuj socioj (plinombriĝintaj-plifortiĝintaj ne malofte sen foresto de perforto).

Rekoninte kaj sciante ĉion ĉi, ni jam estas delonge sub la influo de la penso: super la historie elformiĝintaj (neĝustavorte: naturaj) lingvoj – kun ilia konservo kiel gepatraj lingvoj – ekestu en la rolo de ĝenerala kaj komuna dua lingvo (oni nomas ĝin ankaŭ: helplingvo) tia formaĵo, kiu ne estas gepatra lingvo de iu komunumo, tamen kunigas en si la utilajn kaj konvenajn ecojn de lingvoj diverstipaj, lingvo, kiu malhavas akcesoraĵojn sedimentiĝintajn dum la historie longa evoluvojo. Estas du vojoj imagataj por tiu ekesto: konsciaj intervenoj aŭ spontanea procezo. Ŝajne Stalin aludas la eblecon de elformiĝo per la «kunfandiĝo» de naciaj lingvoj, kiam li pledas por tiu rimarko de Lenin, ke en la fora estonto (en la evoluinta komunismo post la mondskala venko de socialismo), kun la foriĝo de landlimoj, la kulturo de nacioj povas kunfandiĝi en unu komunhoman kulturon, same la lingvoj en unu komunan lingvon. Li aliras ĉi demandon en sia verko «Nacia demando kaj leninismo» (1929) ne de ĉi tiu perspektiva flanko, sed inverse: de la flanko de la nuntempo (la tiama) kaj de la proksima estonto; do la emfazo estas, ne ke la naciaj lingvoj iam *kunfandiĝos,* sed ke ĉi eventuala kunfandiĝo okazos maksimume *en la fora estonto.*

Cetere mem Lenin, en la lokoj cititaj de Stalin, parolas pri la neniigo-neniiĝo de *naciaj* diferencoj (1920); la demando de lingvoj tie ne ĉeestas. Stalin – diskutante kun Kautsky koncerne la historian epokon de socialismo – rekte rifuzas la hipotezon, ke «en la socialismo la tuta homaro havos unusolan universalan lingvon, ĉiuj aliaj lingvoj formortos». Li asertas: «Mi ne tre kredas en la ideo de ĉi universala monda lingvo». – Li kritikas la senpaciencajn hastigantojn de ĉi tiu procezo, kaj priskribas, respektive agnoskas la vojon al «kunfandiĝo de la nacioj kaj naciaj lingvoj en unu komuna tuto» nur kiel teorian perspektivon.

Iom simila fariĝis la situacio post du jardekoj. Stalin kritikis la marrismon (la vulgarmateriismajn doktrinojn de N.J. Marr), kiu tiutempe premis la tutan sovetan lingvosciencon, refutante la malĝustan tezon pri la intermiksiĝo kaj eksploda procezo de la lingvoevoluo. – Kiel pli frue, ankaŭ ĉi tie la aŭtoro ne havis la pretendon prognozi la lingvoevoluon. Li ne eliris de tie, ke ĝis nun unu el la interbatalantaj lingvoj venkis, la alia formortis, sed la estonto estos la *kunfandiĝo;* sed li alvenis al la starpunkto, ke ni ne trovas ekzemplon pri paca kunfandiĝo en la ĝisnuna historio de lingvoj; se entute ni povas paroli pri tiaĵo, tio estas kategorio (almenaŭ) de la *fora estonto.* – Fakte la tezo de kunfandiĝo ĉu en la verko de 1930, ĉu de 1950 estas transŝovo al la estonto kiel rifuzo de koncernigo al la nuntempo, cetere komence preskaŭ hazarde, apendice al la demando de kulturo; kaj ankaŭ poste, kvazaŭ obeante la leĝon de inerteco, la afero de nacia lingvo kuntreniĝas kun la demando de naciaj limoj kaj kulturoj.

Konsiderante la pasinton, lasttempe ankaŭ László Antal simile tion resumas en la lasta ĉapitro de libreto «Postsekve la lingvojn». Koncerne la estonton li estas pli singardema ol Stalin. Post kiam li konvinke demonstras la katastrofecon de la nuna plurlingveco kaj la malavantaĝojn de uzo de natura lingvo kiel «mondlingvo», – kun la sama entuziasmo prezentas: «...la problemo de lingva disigiteco de la mondo estos solvebla nur en tia mondo, kie la socio ne estas disigita... Se la sociaj konfliktoj inter la diversaj partoj de la mondo estos forigitaj, se realiĝos la universala tutplaneda planado, se la planado, antaŭenigo, direktado de la ekonomia vivo de la tuta mondo okazos laŭ unueca konceptaro, se nuliĝos la evoludiferencoj inter la diversaj partoj de la mondo, kaj sekve ni

la lingvo de estonto

kie ajn povas kalkuli pri grandparte sama nivelo de klerigiteco». Nu certe, la solvo laŭ la ĉi-supraj ne estas pli proksima ol laŭ la konceptoj de Stalin. En la pensosekvoj de Antal ĉio ĉi citita estas nur *antaŭkondiĉo* kaj ne al la akcepto kaj enkonduko de komuna dua lingvo, sed nur al ties *estigo;* ĉar laŭ li ankaŭ Esperanto ne estas konsiderebla io pli ol antaŭaĵo al la iama ellaboro de iu artefarita lingvo.

Kion ni profitas el revuado de ĉio ĉi?

a/ Videble: la esploranto, elirante ĉu de la filozofio kaj sociscienco, ĉu de la lingvoscienco, por elimini la nunan plurlingvecon – kun konservo, eĉ paralela evoluigo de la gepatraj lingvoj – alvenos al la ideo de ia (unue eventuale regione transnacia, sed poste mondskale unueca) *komuna dua lingvo.*

b/ La eblecon, ke la rolon de ĉi tiu komuna dua lingvo plenumu iu nacia lingvo, ne opinias ĝusta ankaŭ tiuj, kiuj akceptus tion kiel fakton; ĉiuj konsiderus pli ideala (eventuale ne pli reala), se en tiun rolon venus ia *koncentraĵo, distilaĵo* de la naciaj («naturaj») lingvoj.

c/ Multaj opinias: la marksisma filozofio, sociscienco – por la perspektivo – havas sian elformiĝintan konceptaron pri la lingvoevoluo: la teorio de «kunfandiĝo» laŭ Stalin. Fakte tia teorio ne ekzistas; la rimarkoj de Stalin koncerne ĉi temon neniam naskiĝis kun la intenco difini celon, sed evite forigi la solvon al la estonto; kaj kun samtempa emfazado, ke ne estas konata historia ekzemplo por tia spontanea procezo.

ĉ/ Aliflanke estas sufiĉe disvastiĝinta la kredo, ke «la lingvoscienco» jam antaŭlonge – kaj konvinke – «refutis» la ideon de «artefaritaj» lingvoj ĝenerale, aŭ almenaŭ konkrete la vitalecon de Esperanto kreita de «laiko». – Nu: ni malkovris eĉ ĉe László Antal, esploranto-scienculo de la interlingvistiko, ke li ripetadas *naivajn argumentojn* devenatajn de laikoj de antaŭ pluraj jardekoj. Ni redemandu! Kio estas pli bone uzebla: ĉu la «naturaj» fererco kaj baŭksito, aŭ la el ili «artefarite» ekstraktita fero, aŭ aluminio? !

Fine: kion ni povas aldoni?

En la lingvosciencaj verkoj – multaspekte ankaŭ nun ĝustaj – de Stalin (kaj ankaŭ inter liaj pli fruaj konstatoj koncerne la lingvon, ĉefe ĝian rolon kaj evoluon) la plej diskuteblaj estas ĝuste la prognozoj; ilin refuti oni povas ĝuste per liaj aliaj konstatoj. Se dum la periodoj de instinkta, neregulita evoluo la lingvoj povis tiom rigore konservi sian karakteron (la bazan vorttrezoron kaj la gramatikan sistemon), ke kunfandiĝo kompleta ne povis okazi, estas apenaŭ verŝajne, ke tia procezo ekaperus kiel nova tendenco ĝuste en la periodo de – ankaŭ ĉiterene – normigita kaj konscie regulita evoluo.

Fakte ja ankaŭ la *normigo de naciaj lingvoj* estis «artefarita» enmiksiĝo en la spontanean procezon de asimiliĝo de la proksimaj dialektoj (popolaj lingvoj); la «kunfandiĝo» de malsamdevenaj kaj malsamsistemaj lingvoj estas rekte neimagebla sen *konscia kontribuo.* Estas vere, ke la elektado de komunaj elementoj kaj komunaj trajtoj povas esti diversa, kaj alportus plurajn (samgrade raciajn) rezultojn, tamen estas tute ne certe, ke tio, kio estus «alia», nepre estus pli bona, ol tiu, kiu jam naskiĝis, vivas kaj funkcias.

Ĉar en la – sendube atentinda – bildo, pentrita de Antal pri la estonto, la ekzisto de komuna dua lingvo (helpanta la interkomprenon) almenaŭ tiom estas *antaŭkondiĉo* kiom ĝi povus esti ties *rezulto kaj produkto.* Ŝajnas multe pli kompreneble, ke la homoj komprenos unu la alian reciproke, se (krom pluraj ceteraj) ili havos ankaŭ komunan lingvon por ties realigo, kaj malpli ke oni povas elformi komunan lingvon nur, se la homoj jam ĉiuterene (ankaŭ sen tio) bone komprenas unu la alian.

Sed vere: ĉu Esperanto estas *kapabla* plenumi la gigantan rolon de sia destino, tio estas ke ĝi fariĝu la komuna portanto de la homa kulturo? – La historiaj spertoj montras:

Ĉiu lingvo kapablas tiom, kiom oni uzas ĝin. Esperanto jam hodiaŭ sukcese peras ĉu buŝe, ĉu skribe la poezion, beletron, bone servas al la drama arto, kaj samtempe estas konvena komuna lingvo por serio de sciencaj kaj teknikaj konferencoj, eldonaĵoj kaj publikaĵoj. Do, oni ne povas tiel formuli la starpunkton, ni uzos tiam, kiam ĝi sufiĉe finevoluis; nur inverse: se ni uzas ĝin pli vaste, antaŭenigas ĝin pli celkonscie, ĝi eĉ pli *konformos al la taskoj.*

ENTREPRENO PRI APLIKO DE KOMPUTOTEKNIKO

SZÁMALK

adreso: Budapest, XI.
Szakaszits Árpád u. 68.

leteradreso: H-1502 Budapest 112
pf. 146.

telefono: (36) (1) 853-111

telekso: 22–44–98



Sidejo de SZÁMALK

SZÁMÍTÁSTECHNIKA – ALKALMAZÁSI VÁLLALAT



En komputocentro de SZÁMALK funkcias la plej granda komputilo de Hungario, produktita en socialismaj landoj: ES–1055 el GDR

La taskoj de Entrepreno pri Apliko de Komputotekniko (**SZÁMALK**) difineblas, kun konsidero de la tutlandaj postuloj, sekvontmaniere:

– konsilado, prognozado, informa servo;

– projektado, antaŭpreparo kaj efektivigo de instalado de komputilsistemoj;

– faka edukado kaj pliperfektigo;

– prilaboro de komputoteknikaj sistemoj el importitaj kaj hungaraj elementoj;

– evoluigo de baza programaro kaj de aplikaj sistemoj;

– riparo kaj teknika servo por la encirkuligitaj sistemoj;

– evoluigo de aplikaj sistemoj kun popolekonomia signifo per utiligo de modernaj aplikadaj teknologioj.

La entreprenadoj direktiĝas al ellaboro kaj vendo de **kompleksaj komputoteknikaj aplikaj sistemoj.** Ebliĝas ankaŭ **eksporta** agado kunlabore kun la grandaj hungaraj kaj eksterlandaj firmaoj. La globalan entreprenadon ĝenerale karakterizas la celado al gajno.

Koncerne la ellaboron kaj vendadon de aplikaj sistemoj la plej gravan rolon ludas la pli bona kunordigo de ĉeno «esploro – produktado – vendado». La baza ilaro de aplikoj devas deveni unuavice kaj plejparte el socialisma importo kaj hungara produktado. Tiurilate ankaŭ **SZÁMALK**-on atendas taskoj, konkrete plibonigi kapablon en solvado de taskoj. La evoluigon unuavice necesas bazigi sur **II-an kaj III-an seriojn de komputiloj de UKS**

(Unueca Komputila Sistemo) kaj sur komputiloj de **Minikomputila sistemo de KEI-landoj.** Koncerne tion dum la VI-a kvinjarplano (1981–85) estas planite instali 200 komputilojn.

La unuaranga tasko de **SZÁMALK** estas **makleri** komputilojn de la eksterlanda produktanto ĝenerale el socialismaj landoj al enlandaj uzantoj. Dum tiu laboro estas neevitebla la integrado de rimedoj, devenantaj el diversaj landoj, tio estas la rekonfigurado de sistemoj. Tre gravan rolon ludas ankaŭ la **certigo de baza programaro** kaj la pluevoluigo de la jam ekzistanta baza programaro. En la kampo de uzata programaro necesas partopreni en konvena programarprovizo al uzantoj ankoraŭ ne posedantaj solvojn el hungaraj fontoj, en ellaboro de ekzemplosistemoj, en la bazigo de programar-produktado. Tiu ĉi agado necesigas la estigon de kunlaboro kun aliaj institucioj.

Baza postulo estas, ke **SZÁMALK** kompletigu siajn sistemliverantajn servojn per **propraj evoluigaj rezultoj, servoj.** Unu el tiuj tipaj laboroj estas la **instruado,** en kies perspektivaj rilatoj necesas kalkuli kun la antaŭenigo de pluperfektigaj kursoj por specialaj, kompleksaj taskoj. Krom tio, eĉ se en malkreskanta mezuro tamen daŭras ankaŭ la tradiciaj kursoj por formi fakulojn. La postulo por altigi la direktad-nivelon de entreprenoj antaŭenigas la komputoteknikan edukadon de direktantoj. La edukado devas antaŭi la enlandan evolu-nivelon kaj la esploran, evoluigan kaj servadan agadon de la entreprenoj, ĉar nur tiel eblas certigi la pretendon por pli evoluintaj komputoteknikaj produktoj kaj servoj. La suprajn instruajn formojn **SZÁMALK** devas evoluigi en sistemo konstruita unu sur la alia.

SZÁMALK plenumas tutlandan funkcion sur la tereno de **informado.** La ĉefajn elementojn de ĝia agado difinas la neceso formi fakpolitikan vidmanieron konvenan al tutlandaj interesoj. Al tio apartenas la plenumo de programoj de Komputoteknika Centra Evoluiga Programo, Unueca Komputila Sistemo, Minikomputila Sistemo, Komputoteknika Esplora Celprogramo, Landa Centra Esplor-Evoluiga Plano, sed ankaŭ aliaj taskoj, kiuj servas por malfermi la evoludirektojn, trendojn de komputado, precipe kunlige kun la hungaraj bezonoj kaj ebloj. Plua grava tasko estas la atentigo al agadoj, entreprenadoj kaj servoj de Centra Statistika Oficejo kaj de ĝiaj institucioj, tiuj de **SZÁMALK.** Organikan parton de la informa agado formas la eldona agado. En la eldono de **SZÁMALK** aperas periodaĵoj: **SZÁMITÁSTECHNIKA** (Komputotekniko), **INFORMÁCIÓELEKTRONIKA** (Informo-Elektroniko) kaj multaj faklibroj, helpiloj. La **biblioteko** de la entrepreno kiel «fakbiblioteko kun tutlanda taskaro» servas la fakularon.

Sur la kampo de **teknikaj servoj** la tasko de **SZÁMALK** estas certigi la laŭmarkan riparon de komputiloj, makleritaj de ĝi. Tiu agado enhavas la konsiladon kunligitan kun la instalo de komputiloj, projektadon de instalado kaj la apogon de ĝia realigo, la ekfunkciigon kaj riparadon de komputilaj sistemoj. Tre grava tasko estas la kolekto de datumoj pri la funkciigo kaj ilia transdono al produktantoj, ĉar tiu helpas la pluperfektigon de la nunaj produktoj. La konvena element-provizo estas necesa kondiĉo por la sekura funkciigo. Sur tiu kampo la entrepreno celas instigi siajn liverantojn teni la kontrakt-disciplinon, laŭeble elformi konsignan – sendoganan – deponejon.

Resume ni povas konstati, ke la nova entrepreno surprenas sur sin la plenumon de evoluigaj taskoj kun kompleksa karaktero. Ĝi koncentras sian agadon al rapidigo de noviga procezo, optimumigo de komputoteknika evoluigo, disvolvo de efikaj teknikaj ekonomiaj operacioj, ĉion ĝi plenumas kiel entreprenadon, en la kadroj de racia riskado. Sur la kampo de esploro-evoluigo, ĝi klopodas atingi praktike uzeblajn rezultojn per la kunordigo de ĉiutagaj kaj perspektivaj evoluigoj. Ĝi prepariĝas al ilia vendado en formo de kompleksa produkto. Kiel entreprenado ĝi partoprenas en ellaboro de pli grandaj sistemoj kun popolekonomia signifo.

SZÁMALK profitas el la avantaĝoj de la koncentriĝo, kontentigas racie la pretendojn de la uzantoj, apogas konsekvence la centrajn celojn.

Grava dato en la historio de Esperanto

Historio estas unu el la nemultaj sciencoj, en kiuj sola antaŭe nekonata fakto povas kardinale aliigi niajn ideojn pri ia paĝo de la historia procezo. Tiel estis, ekzemple, en la okazo de la eltrovo de Ameriko (kiu estis la unua?), kaj la trovo de unu-sola makzelo de homa antaŭulo en Afriko multoble plilongigis la evoluvojon de la *Homo sapiens*. Rezulte la historio de la eltrovo de Ameriko kaj la evoluo de la homo estis reverkitaj denove.

Same oni povas diri pri la historio de Esperanto kun nur tiu diferenco, ke nek la trovo de makzelo, nek la trovo de eĉ tuta skeleto de iu neniom modifos niajn sciojn pri la historio. En la scienca kampo ni dume esploras apartajn opiniojn kaj paperajn dokumentojn.

Mi volus informi la esperantistaron pri unu el la ne multenombraj dokumentoj.

En Tifliso (nune Tbiliso, ĉefurbo de Kartvelio), en la jaro 1911 estis publikigita la libro de d-ro Andreo Fiŝer: „Historieto de Esperanto." Ĉi tiu libro estis unu el la unuaj verkoj pri la historio de la Internacia Lingvo. Tre interesaj estas la vortoj sur la 10-a paĝo de la libro: „La 1891-a jaro estas grava dato en la historio de Esperanto: en Azio, en la rusa urbo Vladivostok (Siberio) estis fondita la UNUA OFICIALA ESPERANTISTA SOCIETO! " (majuskloj de A. Fiŝer.) Por kompreni kiomgrade la atesto estas fidinda, ni konatiĝu komence kun la personeco de A. Fiŝer, kaj poste ni revenos al la libro.

„Fiŝer Andreo, ruso, doktoro, kuracisto en Orel, Tiflis, fine ĉefkuracisto en akuŝista instituto en Leningrad. Naskiĝis 1855 en Orel, mortis 27 majo 1930 en Leningrad. Esperantisto de 1892 kaj de tiam senlace laboris por ĝi" (1, p. 141). A. Fiŝer estis ankaŭ direktoro de la Tiflisa Akuŝista Instituto (2), fondinto kaj honora membro de la Kaŭkaza Esperantista Societo, distrikta delegito kaj dumviva membro de UEA (3), membro de la St. Peterburga Societo „Espero" (4).

Sed A. Fiŝer interesiĝis ne nur pri la organiza laboro, li estis ankaŭ produktiva verkisto. Antaŭ la 1911-a jaro li eldonis 45 presitajn verkojn (5, pp. 45-48) kaj plurfoje gajnis premiojn en literaturaj konkursoj (5, 6, 7, 8). La Enciklopedio de Esperanto notas la jenajn libroformajn laboraĵojn de la aŭtoro: *„Kanto de triumfanta amo,* 1908; *Ajno,* 1910; *Fantomoj,* 1912; ĉiuj tri de Turgenev; *Portreto* de Gogol, 1911; *Tri noveloj* de Puŝkin, 1923" (1, p. 141). A. Fiŝer estis aŭtoro de legolibro por lernantoj, legolibro por armenoj, kontribuis al kelkaj periodaj Esperantaj eldonaĵoj (1, samloke).

Sekve ni ne povas ne agnoski, ke A. Fiŝer okupis altan lokon en la socio, estis signifoplena aganto de la movado dum tiuj jaroj. Kompreneble, pro tio li estis elektita gvidanto de la rusa delegacio al VII-a Universala Kongreso de Esperanto en Antwerpen (2).

Kiel mi jam diris, d-ro A. Fiŝer membris St. Peterburgan Esperantistan Societon, kaj tiu ĉi cirkonstanco signifas, ke li estis leganto de la unua Rusuja Esperanta Revuo „Ruslanda Esperantisto", ĉar la revuo estis dissendata al ĉiuj membroj de la Societo (4). Kaj ĉu tia homo, kiel A. Fiŝer, povis ne legadi la solan Esperantan revuon de la lando? Certe ne!

Interalie li legis jenon: „1892 – 1907. Hodiaŭ finiĝas 15 jaroj de tiu tago, kiam estis fondita la unua en Ruslando Societo de esperantistoj" (9), kaj konfirmo de E. Radvan-Ripinski, ke „24 Marto 1892j estis konfirmita de Ministro de Aferoj Internaj unua rusa s-to esperantista Espero en St. Peterburgo" (10, p.4). Samloke: „En 1901j fondiĝis s-to en Vladivostok..." (10, p.6.) De tiu tempo oni opinias, ke la unua oficiala esperantista societo estis St. Peterburga, nune Leningrada (1, p.450, 589).

Sed kial tamen A. Fiŝer malakceptis la aŭtoritatajn atestojn? Kial tamen post 4 jaroj li skribis, ke la unua oficiala societo estis fondita en Vladivostok en la jaro 1891, kaj ne en 1901? Povas esti nur unu respondo: Fiŝer havis ĝustajn faktojn pri la Esperanta movado en la ekstremorienta urbo. Tiuj ĉi faktoj estis tiom nekontesteblaj kaj eivdentaj, ke al A. Fiŝer oni ne eldiris iajn ripročojn konekse Vladivostok-on dum la VII-a Universala Kongreso de Esperanto. Plue: la libro estis premiita (6). Kontraŭ Vladivostok ne ribelis ankaŭ iu A. Ajspurit (laŭ la Enciklopedio, A. Aizpuritis?) en sia recenzo pri A. Fiŝera libro (7). Ni ankaŭ legas pri *Historieto de Esperanto:* „La bela studo perfekte plenumis la malfacilan taskon, resumi en broŝuro la tutan historion de nia lingvo" (1, p. 220). Mi trovis en *La Ondo de Esperanto* nenian deklaron kontraŭ A. Fiŝer. La ateston pri Vladivostok oni akceptis kiel kompreneblan.

Sed povas esti, ke la Peterburgaj esperantistoj provis defendi sian unuaecon (la libro de A. Fiŝer ĝis nun estas konservata en Leningradaj bibliotekoj)? La historia antaŭeco ofte estas la plej grava demando. Kial do ili silentis? Povas esti nur unu kaŭzo: ili estis senfortaj antaŭ la forto de faktoj. Peterburgaj esperantistoj ne nur silentis, ili retiris sin. La konata Peterburga historiisto de Esperanto, E. Radvan-Ripinski en sia skizo, verkita en 1912 por la revuo *La Ondo de Esperanto,* koncentriĝis jam je la neoficiala etapo de la Esperanta histo-

rio (11). Li skribis pri la unuaeco de Nürnberg, pri „privata grupeto" de esperantistoj, organizita en Moskvo en la jaro 1890. E. Radvan-Ripinski en la verko silentis pri Vladivostok, kaj pri (!) la unuaeco de Peterburg. Tiamaniere li rezignis pri sia iama vidpunkto (komparu 10 k 11).

Bedaŭrinde, oni ne scias faktojn pri Vladivostok el tiu tempo, ni ne scias la nomojn de tiuj, kiuj „faris" tiun gravan daton en la historio de Esperanto. E. Radvan-Ripinski nomis (12) kelkajn esperantistojn, kiuj estis tre energiaj en la periodo inter 1892 kaj 1897. Inter ili estas la konata esperantisto N. Kazi-Girej, kiu en la komenco de nia jarcento estis kunfondinto kaj prezidanto de la Manĉuria Societo Esperantista (1, p. 284. 13, p. 5). Ĉu li estis la fondinto de la Vladivostoka societo en la jaro 1891? Aŭ la fondinto estis V.K. Neupokoev, sindona esperantisto, kiu forpasis en 1912, estante estro de la Mara Lernejo, multjara prezidanto de la Vladivostoka Esperantista Societo (14)? Ni ne scias.

Mi konvinkiĝis, ke pri la libro de A. Fiŝer la esperantistaro malmulte scias, ĝi estas preskaŭ nekonata. Tial mi faris tiun ĉi historian esploreton. Mi ne povis silenti, kiel E. Radvan-Ripinski. Mi kredas, ke pravas Oscar Wilde, kiu skribis: „Nia ununura devo antaŭ la historio estas denove reverki ĝin! " Ĉu ne?

V. *Matveev*
Instituto de Mara Biologio
de la Scienc-Akademio de USSR
Vladivostok

Referencaro

1. Enciklopedio de Esperanto. Represo de la unua eldono. Budapest, Hungara Esperanto-Asocio, 1979.

2. Nedoŝivin A.M. Raporto pri VII universala kongreso esperantista en Antverpeno, de 7-a ĝis 14-a de Aŭgusto de n.st. 1911 j. Eldono de la Fako de Komerco de la Ruslanda Ministerio de Komerco kaj Industrio. Kovno, 1912, p. 8.

3. La Ondo de Esperanto, 1911, N 7-8, p. 101.

4. Ruslanda Esperantisto, 1905, N 2, p. 76.

5. Fiŝer A.R. Historieto de Esperanto, Tiflis, Presejo „Esperanto", 1911.

6. La Ondo de Esperanto, 1911, N 9-10, pp.124-133.

7. La Ondo de Esperanto, 1912, N 3, p. 51.

8. La Ondo de Esperanto, 1913, N 7, p. 117.

9. Ruslanda Esperantisto, 1907, N 3, p. 1.

10. Radvan-Ripinski E.V. Skizoj el la esperantista historio. III. Unuaj esperanto-jaroj. La Ondo de Esperanto, 1912, N 3, pp. 52-54.

11. Radvan-Ripinski E.V. Esperanto en Ruslando. Ruslanda Esperantisto, 1907, N 7, pp.1-9.

12. Radvan-Ripinski E.V. Mallonga historia skizo de ideo de l'. internacia lingvo entute kaj de lingvo Esperanto. Ruslanda Esperantisto, 1905, N 1, pp. 5-14.

13. La Ondo de Esperanto, 1913, N 1, p. 5.

14. La Ondo de Esperanto, 1912, N 4, p. 70.

SZILÁRD BÁLINT 75-jara

Li estas konata aktivulo, tradicia novelisto de HV. Okaze de lia duobla datreveno – li estas sesdekjara esperantisto – ni prezentas lin al la legantaro de HV.

Vizitante lin en lia hejmo, mi petis lin skizi sian vivkarieron.

– Mi naskiĝis en la jaro 1909, la 3-an de marto en Budapeŝto, el fervojista familio. Miaj patro kaj avo ankaŭ estis fervojistoj. En mia kvara jaro oni translokis mian patron al Eszék (nun Osijek en Jugoslavio), kiel fervojistan ĉefon. Baldaŭ eksplodis la unua mondmilito. Mi finis la unuan klason de la bazlernejo en kroata lernejo, poste nia familio translokiĝis al Pécs (Peĉ), kiu urbo tiam estis sub serba okupo. Tie mi daŭrigis la studojn de la elementa lernejo kaj kvar klasojn en la ŝtata real-ĉeflernejo. Post tio sekvis nia translokiĝo al Budapeŝto. Pro la variaj loĝejcirkonstancoj la superajn klasojn de la mezlernejo mi finis en diversaj lernejoj de Budapeŝto. Mia konformiĝo al la diversaj lernejtipoj estis malfacila, tamen fine mi faris eminentan abiturientan ekzamenon.

Speciale mi altiriĝis al la literaturo. Mi gajnis plurajn beletrajn konkursojn en la lernejoj kaj jam tiutempe mi aperigis novelojn en diversaj gazetoj.

Ekde 1945 mi ricevis oficistan postenon en Budapeŝto, ĉe la Fervoja Direkcio, kie mi laboris en gvidposteno ĝis mia pensiiĝo 1969. Dumtempe – pro mia labortereno – mi akiris universitatan kvalifikon pri librotenado, kaj tiun pri ŝtata kontrevizio. Mi agadis speciale en ekonomia laborsfero, sed dum dek jaroj mi estis ankaŭ disciplina referanto ĉe la direkcio kaj ano de la dekret-redakcio. Mia aktiva laborperiodo atingis preskaŭ 45 jarojn.

Kompreneble niajn legantojn interesas ankaŭ via esperantista kariero.

– En 1924, en restoracio de la urbo Kispest (Kiŝpeŝt, nun deknaŭa distrikto de Budapeŝto) aranĝis la tiamaj esperantistoj siajn kunvenojn. Ili lernis el la lernolibro de Izsó Polgár. Mi vizitis iliajn kunvenojn, sed post kurta jaro la polico faris finon al la lingvokursoj. Poste sekvis longa paŭzo, sed mi ne malzorgis la lingvon. En 1959 ĉe la Budapeŝta Fervoja Direkcio ni kvarope formis fakgrupon, kiu poste dum jaroj fariĝis la plej granda grupo de la lando, kun 360 membroj. Tiun rezulton ni atingis per tio, ke ni organizis malmultekostajn vojaĝojn eksterlanden, en formo de ŝanĝvizitoj. Nia kondiĉo por la anoj estis la finstudo de la lingvokurso. Tiel ankaŭ multaj el la familianoj farigis komencantaj esperantistoj. Post mia pensiiĝo ĝis nun mi estas „honora prezidanto" de la grupo.

Ankaŭ en la nomo de nia legantaro ni deziras al nia meritplena samideano ankoraŭ plurajn, fruktoplenajn jarojn, bonan sanon, utilajn servojn por la Internacia Lingvo.

István *László*

Hungara „Malfermita Letero" al Margaret Thatcher

Sub la titolo „Malfermita Letero al la Brita Ĉefministro Margaret Thatcher" aperis grava kaj interesa publikaĵo en la ĉijara unua numero de la hungarlingva revuo de HEA „Világ és Nyelv" (Mondo kaj Lingvo). La subskribintoj de la letero estis d-ro János *Balázs,* lingvisto, universitata profesoro; d-ro László *Deme,* lingvisto, universitata profesoro; Gyula *Fekete* kaj Mihály *Gergely,* verkistoj; András *Sugár,* ĉefkunlaboranto de la Hungara Televido; Imre *Szenes,* ĉefredaktoro de „Világ és Nyelv" Ĉiuj subskribintoj estas membroj de la Redakta Komitato de „Világ és Nyelv"

La iniciato pri tiu ĉi malfermita letero venis el Britio. David *Curtis,* brita mezlerneja profesoro skribis leteron al d-ro István *Szerdahelyi,* fakestro de Esperanto ĉe la Budapeŝta Universitato „Eötvös Loránd". Li informis d-ron Szerdahelyi pri tio, ke sinjorino Thatcher en televida intervjuo ricevis la demandon „Kio estas via plej granda deziro? ", kaj ŝi respondis jene: „Mi volus scii naŭ fremdajn lingvojn, por ke mi povu senpere interkompreniĝi kun ĉiuj miaj partneroj en la Eŭropa Komunumo. Kiam mi estis juna, mi aŭdis pri la internacia lingvo Esperanto, sed bedaŭrinde ĝi ne sukcesis. Ĝi estus tre necesa, tial mi tre bedaŭras, ke okazis tiel."

David Curtis raportis, ke post la nomita intervjuo li tuj skribis leteron al la ĉefministro. Kaj informiĝinte el la gazetaro pri tio, ke sinjorino Thatcher vizitos Hungarion, li letere rekomendis al d-ro Szerdahelyi inviti ŝin dum tiu vizito al la Budapeŝta Universitato, por ke la brita ĉefministro ekkonu ankaŭ la opinion de eksterlandaj fakuloj pri la Internacia Lingvo. David Curtis havis la esperon, ke tio povus veki en sinjorino Thatcher efektivan interesiĝon, kaj instigus ŝin subteni Esperanton.

D-ro Szerdahelyi kompreneble sentus honoriga tasko informi la britan ĉefministron pri Esperanto. Tamen, li ne iniciatis tiun inviton, ĉar li konjektis, ke la politikaj intertraktoj kun la hungaraj ŝtataj gvidantoj ne lasus tempon por la vizito.

Post tiuj antecendentoj la Redakta Komitato de „Világ és Nyelv" venis al la konkludo publikigi en la revuo malfermitan leteron al Margaret Thatcher. Laŭ la planoj tiu letero aperus en la n-ro 1984/2, kiu eliras fine de marto, ĉar oni supozis, ke la brita ĉefministro vizitos Hungarion nur tiam. Feliĉe, ankoraŭ ĝustatempe klariĝis, ke la vizito okazos komence de februaro. Necesis do rapide liberigi spacon en la n-ro 1984/1 (jam kompostita kaj presata) – kaj tiamaniere en la dua tago de la Budapeŝta restado de sinjorino Thatcher la koncerna numero kun la malfermita letero aperis.

En la sama tago ekzemplero de tiu revunumero kun anglalingva traduko de la malfermita letero (kun mallonga akompana letero) estis transdonita al hungara kunlaboranto de la gazetara sekcio de la Brita Ambasado en Budapeŝto. Li transdonis ĝin al la dua sekretario de la Ambasado, kaj la dua sekretario persone transdonis la dokumentojn al Margaret Thatcher.

Tiu hungara kunlaboranto mem legis la malfermitan leteron kaj kontrolis ankaŭ la anglan tradukon. En la sekva tago li mem rekone komentis la argumentadon de la letero, kaj havis la opinion, ke ne estos facile respondi al ĝi, sed la brita ĉefministro estas saĝa virino – ĉerte ŝi trovos la ĝustan respondon. Tiu hungara kunlaboranto havis la opinion, ke sinjorino Thatcher certe respondos al la malfermita letero, jam pro tio, ĉar ŝi estis tre kontenta pri la intertraktoj kun la hungaraj ŝtataj gvidantoj – malgraŭ la reale ekzistantaj ideologiaj kaj politikaj diferencoj inter la brita kaj hungara starpunktoj.

La subskribintoj de la malfermita letero ne havas iluziojn pri tio, ke ili povis konvinki la britan ĉefministron pri la vivkapablo kaj funkciado de Esperanto. Sed ili trovis, ke la citita fragmento de la televida intervjuo enhavas interesan kontraŭdiron, kaj estus domaĝe ne profiti la okazon por doni elokventan kaj iom polemikan reagon al la eldiro, ke Esperanto ne sukcesis. Tial ni estas tre dankaj al David Curtis, kiu faris al ni proponon atestantan pri iniciatemo kaj pri bona kompreno de la informaj devoj de esperantistoj. Pro la cirkonstancoj lia propono modifiĝis, ricevis pli realajn konturojn, sed pro la publika karaktero de la malfermita letero la formo de la realiĝo eble fariĝis eĉ pli efika. (La tekston de la letero kompreneble ni sendis al David Curtis.) Tiamaniere la tuta agado havis sendube utilon eĉ en la kazo, se la brita ĉefministro tamen ne respondos. Ja malfermita letero estas ĝenro, kiu direktiĝas unuavice al la publiko. Pluraj neesperantistaj legantoj de „Világ és Nyelv" esprimis sian rekonon pro la multflanka kaj funda argumentado kaj respektplene polemika tono de la malfermita letero.

La internacia Esperanto-movado povus multe profiti el tio, se la brita ĉefministro surbaze de la montritaj faktoj modifus sian opinion pri Esperanto, kaj ŝi esprimus tion en formo de respondo al la malfermita letero. Kompreneble, tiun respondon publikigus „Világ és Nyelv" kaj ankaŭ Hungara Vivo.

Tamen, sendepende de tio, ĉu venos respondo, ĉu ne, ĉiam ni devas esti pretaj reagi al publikaj eldiroj, similaj al tiu de la brita ĉefministro.

Imre *Szenes*

Margaret Thatcher butikumas en Budapeŝto

Pri la libroeldonado de Hungara Esperanto-Asocio

„La situacio nun estas jena: okcidente oni eldonas Esperantajn librojn, sed ne aĉetas ilin; oriente oni aĉetus Esperantajn librojn, sed tiaj ne estas eldonitaj tie, nek la okcidente eldonitaj estas aĉeteblaj. Okcidente mankas la kultursoifo kaj tio paralizas la libroeldonadon. Oriente la kultursoifo estas granda, sed ne estas kontentigita. Oni devus trarompi la barierojn, kiuj malhelpas la libroeldonadon ĉe ni kaj en aliaj popolrespublikoj. Kaj tiam sur la triumflisto de la kultura revolucio oni povus meti ankoraŭ unu punkton: La triumfon de la Esperanta mondliteraturo."

La suprajn vortojn ni citis el la prelego de Kálmán Kalocsay, farita en 1965 pri „La hungara kultura revolucio". Li mortis en februaro de 1976, sed dum la ĝis tiam pasintaj dek unu jaroj lia deziro ne plenumiĝis: Esperantaj libroj en Hungario aperis nur sporade. Tamen, apenaŭ ok monatojn post lia morto aperis en la eldono de Hungara Esperanto-Asocio la represo de la originala novelaro **Koko krias jam!** de Ferenc Szilágyi, kaj tiu libro estis la uverturo de vasta eldona agado, el kiu rezultis ĝis nun ĉ. okdek Esperantaj libroj kun suma eldonkvanto de pli ol 250 mil ekzempleroj. (Tiuj ciferoj **ne** inkluzivas vortarojn, kaj lernolibrojn!)

Represoj

La agado startis kun represoj. Tio okazis pro du kialoj: unu praktika kaj unu principa. La praktika kialo estis, ke represoj postulis malpli da laboro, do la ankoraŭ senspertaj aktivuloj pli facile solvis tiun taskon. La principa kialo estis havigi al la esperantistoj almenaŭ kelkajn el la klasikaj verkoj de la Esperanta literaturo. Tiel aperis interalie la esearo **De paĝo al paĝo** de L. Tárkony kaj la poemaro **Kvaropo** de Auld-Dinwoodie-Francis-Rossetti. Tiu ĉi lasta verko aperis en 2000 ekzempleroj, kaj dum ne tre longa tempo ĝi elĉerpiĝis. (La unua eldono ĉe Stafeto aperis nur en 1000 ekzempleroj.) Pluaj klasikaj verkoj, kiuj estis reeldonitaj: **El la „Verda Biblio"** de I. Lejzerowicz, satiro esperantista, krimkomedio de F.V. Dorno, **Enciklopedio de Esperanto** ktp.



István Nemere, pri kies ses originalaj verkoj oni povas legi prezenton sur la sekva pagoparo

Tiuj ĉi represoj nepre kontribuis al la kultura homogenigo de la esperantista komunumo. La saman celon deziris servi ankaŭ tiaj eldonaĵoj, kiel **Gvidlibro por supera ekzameno**, kiu relative amplekse pritraktas la historion de la Esperanto-movado kaj de la Esperanta literaturo; **Baza literatura krestomatio**, kiu donas per specimenoj superrigardon pri la tuta Esperanta literaturo, ekde la komenco ĝis niaj tagoj; **Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado**, kiu analizas mem la esperantistan komunumon. **25 jaroj**, antologio redaktita premiitaj verkoj de Belartaj konkursoj, celis prezenti la Esperantan literaturon inter 1951-1975.

Grandaj fortostreĉoj

La plej grandaj financaj fortostreĉoj de nia eldona agado estis la tri plej ampleksaj verkoj: **Enciklopedio de Esperanto** (600 p.) **Tutmonda Sonoro** (en du volumoj 664 p.) kaj **Hungara Antologio** (447 p.). Sed la rezulto valoris la penon: **Enciklopedio de Esperanto** (2000 ekz.) disvendiĝis dum du jaroj, el **Tutmonda Sonoro** (aperinta en 1500 ekz.) restas nur malpli ol 500 ekzempleroj, kaj el la 2000-ekzemplera eldonkvanto de **Hungara Antologio** dum dek monatoj vendiĝis preskaŭ la duono. La supraj libroj estas kompreneble multekostaj, do la vendrezultojn oni povas trovi vere imponaj, precipe tiun de **Tutmonda Sonoro**, ja onidire la publiko „ne bezonas poemarojn".

Originala beletro

Fidele al la tradicioj de „Literatura Mondo", Hungara Esperanto-Asocio ĉiam donis apartan atenton al la flegado de la originala Esperanta beletro. Dum la lastaj jaroj aperis jam ne unuavice represoj, sed novaj, valoraj beletraĵoj. La novelaro **Lappar, la Antikristo** de Endre Tóth – certe unu el la plej maturaj novelaroj de la lastaj jardekoj – eĉ gajnis la titolon „La Libro de la Jaro 1982". Kun granda elano startis la hungara esperantista prozisto István Nemere: dum la lastaj dudek monatoj aperis unu novelaro kaj kvar romanoj de li. Lia kvina romano – **La Monto** – estas presata, kaj komence de la venonta jaro aperos du pluaj romanoj de li.

HEA volas certigi eblecon unuavice al la hungaraj esperantistaj aŭtoroj, tamen lastatempe ĝi eldonis la novelaron **Iluzioj** de Lorjak (franco) kaj la dokumentan dramon **Ni vivos!** de Julian Modest (bulgaro). Ĝis somero aperos po unu plia verko de ili: la humura krimromano **Eŭlalia** de Lorjak, kaj la nostalgie lirika romaneto **La ora Pozidono** de Julian Modest.

Apud la senduba prioritato de originalaĵoj aperis abunde ankaŭ tradukitaj verkoj, ĉefe el la hungara literaturo, tamen ankaŭ tradukaĵoj el aliaj lingvoj. Jen, kelkaj el ili: **Hundbazaro**,

kolekto de 33 ravaj kaj bonege tradukitaj porinfanaj poemoj, du romanoj de Frigyes Karinthy (**Vojaĝo al Faremido** kaj **Kapilario**), la korprema longa rakonto **Malriĉaj homoj** de Zsigmond Móricz, kaj la klasika junulara romano **La knaboj de Paŭlo-strato** de la tutmonde konata hungara verkisto Ferenc Molnár. El aliaj literaturoj aperis la soveta junulara romano **Timur kaj lia taĉmento** de A. Gajdar kaj la bulgara romano **Vilaĝo Borovo** de K. Velkov.

Libroj por progresantoj

Ni rimarkis, ke estas granda bezono por libroj, kiujn povas eklegi ankaŭ esperantistoj, ĵus finintaj la elementan kurson. Tiuj homoj estas la estontaj legantoj de nia altnivela beletro, sed ili bezonas helpon por atingi la necesan lingvan kompetentecon. Por tiu vasta tavolo de esperantistoj estis eldonitaj la tre belaspektaj bildstriaj adaptaĵoj de pluraj klasikaj romanoj: **La filoj de l' ŝtonkora homo** de M. Jókai, **Steloj de Eger** de G. Gárdonyi, **La Faraono** de B. Prus, **La aventuroj de Tom Sawyer** kaj **La aventuroj de Huckleberry Finn** de M. Twain. Tiujn esperantistojn servas la represo de la ĉarme eksmoda sed didaktike brila romaneto **La Verda Koro** de Julio Baghy, la prilingvaj artikoloj **Marĝene de la lernolibro** de Bernard Golden, la represo de **Amuzaj dialogoj** de A. Lienhardt kaj la ĵusa eldono de la elstara libro de la sama aŭtoro: **Amuza legolibro en Esperanto** kiu enhavas cent amuzajn historiojn, kun 2000 didaktikaj demandoj kaj respondoj. La lingvan perfektigadon servas la reeldono de la fama praktika gramatika libro de H. Seppik: **La tuta Esperanto,** kiel ankaŭ **Gramatika demandaro resuma** de Julio Baghy.

Fakaj libroj

Dum la lasta tempo startis ankaŭ signifa faka eldona agado en Hungario, eĉ ekster la kadroj de HEA. Aperis en ses volumoj sur 1126 paĝoj entute 90 prelegoj de komputista simpozio, okazinta fine de 1982 en Budapeŝto, artikolaro pri personaj komputiloj, baldaŭ eliros du pliaj artikolaroj: unu pri la retoj, alia pri la tekstoprilaborado. Preskaŭ en ĉiu jaro aperis kaj daŭre aperas 80- 100 paĝaj kajeroj sub titolo **Sciencaj Komunikaĵoj** – ekde la lasta jam en la eldono de la Scienca Eldoncentro de UEA en Budapeŝto.

Kion alportos la estonto?

La bazoj de daŭra vasta agado estas je dispono, tamen estas necese, ke la esperantistoj estu pli bone informitaj pri niaj libroj, ja nur informiteco povas naski aĉetemon. Ni ne plendas pri indiferento, tamen, ni kredas, ke restas ankoraŭ multaj esperantistoj, kiuj ne scias pri la amaso de la libroj, aperantaj en Budapeŝto. Jen, por fini tiun ĉi artikolon, la denombrado de la libroj, kiuj eliris/eliros ĝis la fino de la unua jarduono de 1984: **Amuza legolibro en Esperanto** de A. Lienhardt, **La tuta Esperanto** de H. Seppik, **Febro** (originala romano) de I. Nemere, **Eŭlalia** (originala romano) de Lorjak, **Sep vangofrapoj** (romano tradukita el la hungara) de K. Aszlányi, **Varmega kamparo** (romano tradukita el la hungara) de Zs. Móricz, **La ora Pozidono** (originala romaneto) de J. Modest, **Johano la brava** (popolfabelo en versoj) de S. Petőfi, **La Monto** (originala romano) de I. Nemere, kaj du komputistaj artikolaroj: **Retoj** kaj **Tekstoprilaboro.**

Dek unu libroj dum ses monatoj – ne malŝatinda oferto, ĉu ne?

Vilmos *Benczik*

Esperanta libroprodukto

Antaŭ kelkaj jaroj regule ni aperigis birdokulan statistikon pri la jara Esperanta libroprodukto – nun ni revenas al tiu ĉi kutimo. La bazo de la statistiko ankaŭ nun estas la rubriko „Laste aperis..." en la revuo „Esperanto". Eniris la statistikon tiuj libroj, pri kiuj aperis informo en tiu rubriko dum la koncerna jaro, sendepende de tio, kiam fakte eliris el la presejo la koncerna libro. Tiu principo estas prava, ja pri iu ajn libro la plimulto de la esperantista publiko informiĝas per tiu rubriko – oni povas diri, ke iu libro vere aperas nur tiam, kiam en „Laste aperis..." oni informis jam pri ĝi. (Ni aldonu, ke en tiu rubriko la Centra Oficejo de UEA registras nur tiujn librojn, el kiuj la eldonejo alsendas du ekzemplerojn.)

Jen la statistiko. Por komparo ni publikigas ankaŭ la ciferojn de la jaroj 1979 kaj 1982. Parenteze staras la ciferoj de la Hungarlanda produktado: oni povas vidi, ke la hungara partopreno de la tutmonda Esperanta libroproduktado havas ŝatindan proporcion.

	1979	**1982**	**1983**
Nombro de ĉiuj libroj en kaj pri Esperanto	160	228 *(10)*	219 *(28)*
Suma paĝonombro de tiuj	17 407	30 844 *(2043)*	33 139 *(5049)*
Nombro de originalaj beletraj verkoj	14	22 *(3)*	23 *(9)*
Suma paĝonombro de tiuj	2530	2734 *(569)*	3529 *(1551)*
Nombro de tradukitaj beletraj verkoj	38	51 *(3)*	42 *(3)*
Nombro de nefikciaj verkoj	63	107 *(3)*	95 *16)*
Suma paĝonombro de tiuj	6902	14 307 *(507)*	8678 *(2866)*
Nacilingvaj verkoj pri Esperanto kaj lerniloj	45	48 *(1)*	59 *(0)*
Meza paĝonombro de Esperantaj libroj	109	135 *(204)*	151 *(180)*
Meza prezo de Esperantaj libroj (en ned.gld.)	10,42	11,80	15,29

SES LIBROJ DE ISTVÁN NEMERE

LA NAŬA KANALO

István Nemere: La naŭa kanalo. Novelaro, originale verkita en Esperanto. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1981. ISBN 963 571 037 2. 105 p. 21 cm. Prezo: 13,80 ned.gld.

„Sur la naŭa kanalo ne ekzistas programo" – diras la alvokita fakulo, tamen, la protagonisto de la titoldona rakonto ricevas mistere belajn programojn per tiu ĉi kanalo, kaj poste okazas al li aferoj eĉ pli surprizaj. Krom tiu ĉi – 23-paĝa – rakonto troviĝas en la volumo tridek aliaj noveloj, skizoj, kun tre varia temaro. Iuj el ili estas spirhaltige ekscitaj, aliaj mole poeziaj aŭ penetre psikologiaj. Foje la temo estas mistera, foje simple ĉiutaga, sed Nemere ĉiam sukcesas montri al la leganto iun ĝis nun nur konjektitan, sed nekonatan econ de la homa animo, iun novan aspekton de la deziroj, aspiroj de la homo.

La plej multaj noveloj de la kolekto estas 1-3-paĝaj, sekve ili taŭgas ankaŭ kiel postkursaj legaĵoj. Kaj pro la fakto, ke Nemere uzas vere *simplan* Esperanton, sen neologismoj kaj komplikaj frazoj, eĉ komencantoj kuraĝe eklegu tiujn ĉi novelojn. Cetere, la ĝisnunaj recenzoj aparte emfazis la *vivecon* de la lingvaĵo en ĉiuj Nemere-libroj, kaj trovis laŭdajn vortojn precipe pri lia libere kaj facile fluanta konversacia stilo.

Pluraj noveloj de tiu ĉi kolekto jam aperis ankaŭ en hungara traduko.

LA FERMITA URBO

István Nemere: La fermita urbo. Sciencfikcia romano, originale verkita en Esperanto. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1982. ISBN 963 571 075 5. 129 p. 21 cm. Prezo: 13,80 ned.gld.

Mark Bellor, juna psikosociologo vivas en la paca, kvieta, preskaŭ-perfekta 26-a jarcento. Li komencas sian karieron en renoma esplorinstituto, kaj lia feliĉo estas sennuba, ĝis iun tagon li rimarkas aferojn nenormalajn, interalie tion, ke la instituto konsumas neproporcie multe da nutraĵoj kaj elektra energio. Kie malaperas tiu nutraĵkvanto, kaj kie konsumiĝas la elektra energio? La juna Mark Bellor timas neniun riskon, kaj koste de multaj vivdanĝeroj kaj aventuroj li solvas la enigmon.

Sciencfikciaj verkoj ofte deziras impresi siajn legantojn per diversaj strangaj maŝinoj kaj amaso da sciencaj konceptoj malfacile kompreneblaj por ordinaraj homoj. Nemere ne cedas al tiu tento: li skribas unuavice kaj ĉefe pri la homo. Pri la homoj, kiuj kreis per siaj inteligento kaj laboro harmonian mondon, sed inter kiuj tamen troviĝas kelkaj, kiuj ne kapablas forfeti el si regemon, perfortemon, kruelecon, kaj preferas reiri al la cirkonstancoj de la 15-a jarcento, por povi lasi liberan fluon al siaj anakronismaj agresivaj ecoj. En tiu ĉi senco **La fermita urbo** *daŭrigas la pensoĉenon de Sándor* Szathmári, *kies verkoj jam apartenas al la klasikaj valoroj de la Esperanta literaturo.*

LA BLINDA BIRDO

István Nemere: La blinda birdo. Romano, originale verkita en Esperanto. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1983. ISBN 963 571 104 2. 118 p. 21 cm. Prezo: 15,- ned.gld.

Govan Dyebo, nigrahaŭta verkisto, sen permeso forlasas sian landon, la Sudan Respublikon, por partopreni en verkista konferenco, okazanta en Skandio. En la konferenco li diras kritikajn vortojn pri la politiko de sia registaro. Estas evidente, ke li ne povis tion fari senpune; post sia reveno baldaŭ li estas malliberigita.

Sven Viborg, juna Skandia verkisto partoprenis tiun konferencon, kaj la vortoj de Dyebo profunde impresis lin. El tiu impreso burĝonas amikeco inter la du verkistoj. Kiam Viborg informiĝas pri la malliberigo de Dyebo, li decidas iel ajn liberigi la nigran verkiston. Ĉar liaj klopodoj per oficialaj rimedoj estas senfruktaj, li memveturas al la Suda Respubliko. Sed tie lin atendas mondo multe diferencanta disde tiu, al kiu li kutimiĝis en Skandio. Tamen, Viborg akceptas ĉiajn riskojn kaj oferojn por atingi sian celon. Li travivas multajn aventurojn: luktante kontraŭ la aŭtoritatoj de la Suda Respubliko, fuĝante de antaŭ ili, pasigante nokton en la tendaro de la Liberiga Fronto. Nemere prezentas ĉion ĉi en ege legiga stilo, tamen ne unuflanke. Prenante sian pozicion, ĉiam li vidigas al ni ankaŭ la alian flankon de la medalo.

Tiu ĉi romano aperis ankaŭ en hungara traduko.

SES LIBROJ DE ISTVÁN NEMERE

SUR KAMPO GRANITA

István Nemere: Sur kampo granita. Romano, originale verkita en Esperanto. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1983.
ISBN 963 571 120 9
128 p. 21 cm. Prezo: 15,- ned.gld.

Ĉu krimo, farita sub la premo de cirkonstancoj, povas resti nepunita? Ĉu plurjardeka honesta, eĉ sinofera vivo povas fari neokazinta la junaĝe faritan krimon, la ekzekutigon de tuta familio?

Tiujn demandojn lanĉas Nemere en tiu ĉi romano, kies protagonisto estas Martin Dregger, germana viro, kiu dum la dua mondmilito en Italio ekzekutigis tutan kamparanan familion, ĉar la familio kaŝis partizanojn. Dregger mem ne volis fari tion, tamen li obeis la armeajn leĝojn, kaj donis la ordonon por la ekzekuto. Post la milito li forlasis Germanion kaj ekloĝis en Svislando, kaj, kiel oficisto de la Internacia Ruĝa Kruco li klopodis kompensi la homaron pro la iam farita krimo.

Post pli ol du jardekoj ĵurnalistoj malkovris la iaman krimon. Dregger, eluzante la kelkajn liberajn horojn, kiuj restis por li, veturas al la itala vilaĝo, kie li faris la krimon. Li alvenas vespere en la trinkejo de la vilaĝo, kaj tie li provas klarigi al la vilaĝanoj sian faron... La agado de la romano estas tiu tutnokta interparolado.

„Sur kampo granita" estas sendube la plej elstara originala romano, aperinta dum la lasta jardeko. Ĝia hungarlingva eldono estas en preparo.

FEBRO

István Nemere: Febro. Romano, originale verkita en Esperanto. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1984.
ISBN 963 571 143 3
132 p. 21 cm. Prezo: 15,- ned.gld.

Anna, la bela, delikata 35-jara virino vivas en ne vere harmonia atmosfero kun sia edzo. Tio estas klara por la protagonisto de la romano, verkita en „mi"-formo, jam ekde la unua momento. Inter li kaj ŝi disvolviĝas amrilato, tradicia, nostalgiige bela, kiu atingas ankaŭ la kulminon. Kaj tiam, dum mallonga eksterlanda foresto de la protagonisto, Anna mortas. Laŭ la oficialaj aktoj ŝi mortigis sin.

Ŝajne ĉiuj kredas tion, krom li. Li komencas persekuti la edzon, ĉar li estas certa, ke Anna ne mortigis sin – ŝin murdis la edzo. Dum la persekutado, detektivado reviviĝas en ŝi la tuta historio de la disvolviĝanta amo de du maturaj, delikataj homoj, por kiuj la vivo estas ne vico de leĝere traviveblaj aventuroj, sed la unika ŝanco de la homo.

Nemere montras en tiu ĉi romano tute novan aspekton de sia talento; li priskribas la plej tenerajn, revajn manifestiĝojn de la homa animo kun rava simplo, aŭtentikeco kaj profunda kunsento, plena kompreno. El la kombiniĝo de la elementoj de amromano, psikologia romano kaj detektivromano rezultas tute unika atmosfero, kiu longe postŝvebos en la animo de la legantoj.

LA MONTO

István Nemere: La Monto. Romano, originale verkita en Esperanto. Eldonos ĝis la fino de 1984: Hungara Esperanto-Asocio.
ISBN 963 571 140 9
ĉ. 200 p. 21 cm. Prezo: 18,- ned.gld.

En nedifinita lando milito finiĝis nur antaŭ kelkaj jaroj. Oni ankoraŭ laboras por esplori la sorton de la malaperintoj. Evidentiĝas, ke el iu urbeto malaperis senspure kvar soldatoj, kiuj probable iris al la proksima Monto, sur kies supro vivas iom stranga komunumo, konsistanta nur el kelkaj dekoj da homoj.

Majoro Reman ricevas la taskon malkovri la veron pri la kvar malaperintaj soldatoj. Li do iras al la Monto, por ekscii pri ili ion de la montanoj. Li trovas ke la homoj, vivantaj tie inter tre simplaj cirkonstancoj, estas honestaj, simplanimaj. Inter ili regas plena harmonio, ili abomenas ĉian perforton, estas sinceraj, tamen, kiam li demandas pri la kvar soldatoj, sur iliaj vizaĝoj aperas embaraso. Reman konstatas, ke inter la montanoj ŝvebas ia peza sekreto, kaj li decidas nepre ekscii ĝin.

Li sukcesas pri tio, sed dum la kelktaga restado sur la Monto multe ŝanĝiĝas liaj vidpunktoj pri la problemo de la malaperintoj, eĉ pri la vivo mem. Kiam fininte la laboron li forlasas la Monton, li faras tion iom malvolonte, kun nostalgio por la nature libera vivmaniero de la montanoj.

La hungara traduko de tiu ĉi verko estas en preparo.



Du poemoj de Attila József

Bet-Leĥem

En nebulvindoj korvoj molaj aras,
malhelo nestas sur la splenaj heĝoj.
Sur argilplankon de kabano falas
bastonaj du paŝtistoj kaj tri reĝoj.
Descendas ino sur kamer-eskalo,
„Anĝel' de dio! " – uloj kvin arias.
Taglaboristo sterkas en la stalo,
kokinoj hirtaj malsat-plende krias.
En frosta pajlo ŝrumpas la terpomoj,
de la tegmento mornas kanmentono,
konsole krispas supo kun aromoj
ŝvebantaj kun la kanto al plafono.
Jesuo loĝas en kajero flava,
inter kuŝantaj brutoj ĝoje satas,
kaj la piuloj en flambrilo rava
ĉirkaŭ la trogo ŝajne eksaltadas.
Mensogo. Pajlo-kontentigon pelas
sinjora vento, dum hungaroj ŝvitas;
la du paŝtistoj per kukafoj ŝvelas,
kaj la tri reĝoj en brandaĉon ridas.

El la hungara: Imre Szabó

Odo

1

Jen, mi sidas sur la rok' de glimoj.
Tra la somero
svelta brizo ŝvebas kiel varmo
de kunmanĝo dum vespero.
Sorbas mian koron malalarmo.
Ne malfacilas –
svarmas al mi are la iamo,
klinas sin la kapo, kaj la mano
humilas.

Mi rigardas la montaron –
vian frunto-klaron
la folioj re-rebrilas.
Nun la voj' ne iun gvidas,
via jup' – mi tamen vidas –
en vent' subtilas.
Vidas mi sub delikataj frondoj
viajn harojn en disfalaj ondoj,
viajn molajn mamojn pulse rondi,
kaj en la forkuro de rivero
mi revidas sur ŝtonero
ĉiu' jen sur viaj dentoj
la feinan ridon ek-ekfonti.

2

Mi amegas vin, ho, kiom flame,
kiu universojn de la foro
kaj insidan, ruzan solecegon
en profundaj kavoj de la koro
ekvoĉigis same.
Propran bruon kiel akvofalo
min forlasas, kuras vi al muto mara,
kaj mi inter rokaj pintoj de fatalo
tondras, ŝrikas vaste per sinpelo
batiĝante inter tero kaj ĉielo,
ke mi amas vin, kruela-kara!

3

Amas mi vin kiel fil' patrinon,
mutaj grotoj kiel propran sinon,
amas mi vin: ĉambroj kiel lumon,
korpo la kvieton, flamon la animo,
amas mi vin kiel vivan sunon
mortemuloj amas ĝis la fino.

Vin mi gardas en la movoj, vortoj, ridoj,
kiel tero ĉion falan al si ligas.
Mi en cerbo per instinktoj, per acidoj
fiksis vin neniam malapera,
vi kara, bela,
ĉiun sencon tie vi plenigas.
La minutoj fortiriĝe knaras,
sed vi sidas inter orelmuroj,
steloj ekbrilegas kaj subfalas,
sed vi fikse firmas en okuloj.
Kiel muto en la groto solas,
vi arome en la buŝ' pendolas,
via mano delikat-vejnara
sur la glas' kristala
ekaŭroras.

4

Ho, mi estas kia materialo,
kiun tranĉas, formas vi per vido gema?
Kia lumo kaj kia animo,
kia fenomeno de sublimo,
ke mi migras tra l' nenio-nebularo
sur pejzaĝoj de via korp' fruktema?

En aperta menso kiel vorto vera,
malleviĝas mi en via mem' mistera! ...

Viaj vejnoj, kiel la rozujoj,
senĉese tremas.

La kurent' eterne kuras, por ke
survizaĝe floru via amo,
kaj utere fruktu la benita flamo.

La senteman humon de stomako
la radikoj en zigzago
brodas, ĉiu eta brako
kunplektiĝas en reago –
por ke kunariĝu ĉiu ĉelo-lago
kaj la frondaj pulmoj en torako
flustru gloron de spir-vago.

La materio marŝas jen feliĉe
tra tuneloj de intensoj svarmaj,
la skorion revivigas riĉe
bolaj putoj de la renoj varmaj.

Ondo de montetoj ekvilibras,
en vi bildo de stelaroj vibras,
zumas lagoj kaj fabrik-demonoj,
svarmas besto-milionoj,
ŝarkoj,
algoj,
la kruela kaj la bona kerno;
sunoj brilas, blankaj noktoj diafanas,
kaŝe en vi mem titanas
senkonscie la eterno.

5

Kiel bula sango gutas,
antaŭ vin jen falas
tiuj vortoj.
Nun la viv' balbutas,
nur la leĝo pure klaras.
La organoj, kiuj min renaskas
ĉiutage, ekmutante jam fiaskas
armi sin per fortoj.

Sed nun ili ĉiuj krias –
Elektita el areg' de homoj,
el la dumil milionoj,
ho vi, unusola,
lito viva, tombo forta, vi lulilo mola,
min akceptu en vi! ...

(En aŭroro soras la ĉielo!
Aroj glimas en la erca foro.
La okulojn vundas tiu helo.
Mi perdiĝos en angoro.
Super mi tre alte krakas,
batas mia koro.)

6
(Flanka kanto)

(Min portas trajno proksimiĝe,
vin eble trovos mi feliĉe,
ekpacos eble tiu flamo,
kaj eble diros vi kun amo:

Jen, por vi bano jam varmetas!
Jen, por vi mola tuko pretas!
Jen, manĝo por la apetito!
Por kuŝi jen, komuna lito.)

El la hungara: Imre Szabó

PANORAMO

Privataj agrikulturaj produktistoj mem vendas siajn varojn



Trolebuso en Budapeŝto

Nekutime granda neĝo en Sud-Orienta Hungario

Privata produktado

Estas konate, ke en Hungario ĉ. 97 procentoj de la agroj estas en kooperativa aŭ ŝtata posedo, tamen, en la produktado de kelkaj agrikulturaj varoj havas signifan proporcion privatuloj: plejparte kooperativanoj, kiuj ricevas difinitan negrandan areon por ĝardenkultura kultivado, kaj ne-agrikulturaj laboruloj, kiuj post sia normala laboro okupiĝas pri agrikultura produktado. El tiu ĉi „privata sektoro" venas 25 procentoj de la bovviando, 55 procentoj de la porkviando, 30 procentoj de la kortbirdoj kaj lakto, 60 procentoj de ovoj kaj 50 procentoj de fruktoj kaj legomoj. Estas konstateble, ke tiu privata produktado konsiderinde kontribuas ne nur al la bona enlanda nutraĵoferto, sed ankaŭ al la ŝatinde granda agrikultura eksporto de Hungario.

Trolebusoj en Budapeŝto

Antaŭ nur deko da jaroj trolebusoj ŝajnis havi sian agonion, sed la naftokrizo kaj la kresko de la atento al la ekologiaj problemoj ŝanĝis tiun tendencon. Montriĝis, ke trolebusoj estas tre idealaj trafikiloj por enurba uzo: ili funkcias per elektra energio (do eblas ŝpari nafton), estas senbruaj kaj ne eligas venenajn gasojn. Lastatempe en Budapeŝto multloke oni uzas trolebusojn, kie pli frue trafikis aŭtobusoj – por la bono de la aero de la hungara ĉefurbo.

Neĝa blokado

Nekutime granda neĝado komence de februaro kvazaŭ paralizis la vivon de Sud-Orienta Hungario. Aro da vilaĝoj kaj kelkaj malgrandaj urboj dum pluraj tagoj ne estis atingeblaj, kaj la neĝo, frosto kaj ventego kaŭzis damaĝojn, pluraj homoj eĉ mortis pro la eksterordinara vetero.

PANORAMO

Nacia funebro

La 14-an de februaro, la tagon de la entombigo de Jurij V. *Andropov*, ĉefsekretario de la Komunista Partio de Sovetio, estis nacia funebra tago en Hungario. Post la informo pri la morto de Jurij V. Andropov multaj miloj da hungaroj faris viziton al la Budapeŝta Ambasadejo de Sovetio por esprimi sian kondolencon pro la malĝojiga evento.

Hungaroj kondolencas en la Budapeŝta Soveta Ambasadejo

Pérez de Cuellar en Budapeŝto

Javier *Pérez de Cuellar*, la ĉefsekretario de Unuiĝintaj Nacioj fine de februaro vizitis Budapeŝton. Ĝi estis la kvara simila vizito en la hungara ĉefurbo: la unuan fojon en 1963 venis al Budapeŝto la tiama ĉefsekretario *U Thant*, en la sepdekaj jaroj Kurt *Waldheim* vizitis Hungarion de foje. Pérez de Cuellar alvenis laŭ la invito de la hungara ministro pri eksteraj rilatoj Péter *Várkonyi*, sed li havis intertraktojn ankaŭ kun la ĉefministro György *Lázár* kaj kun la prezidanto de la Prezidia Konsilio Pál *Losonczi*. En la gazetara konferenco, okazinta fine de la vizito, Pérez de Cuellar emfazis, ke UN klopodas plenumi pli aktivan rolon en la intensigo de la internacia kunlaborado kaj la konservo de la monda paco.

Pál Losonczi kaj Pérez de Cuellar

Bilanco de la ekstera komerco

La jaro 1983 estis sukcesa por la hungara ekstera komerco – daŭras la favora procezo de la ekvilibrigo, komencita antaŭ kelkaj jaroj. Tio rilatas unuavice la eksteran komercon, kalkulatan per okcidentaj valutoj. Jen, la bilancaj ciferoj de la lastaj kvin jaroj, en milionoj da dolaroj:

1979:	–288,0
1980:	– 14,6
1981:	+ 42,2
1982:	+516,8
1983:	+658,9

Estas videble, ke la tendenco estas pozitiva: tio ŝuldiĝas al tre racia ekonomia politiko, kiu – bedaŭrinde – devas inkluzivi ankaŭ stagnantan vivnivelon kaj ĉ. 7-8 procentan jaran kreskon de prezoj.

METALLOGLOBUS

Informas la servo por klientoj.

Budapest XIII. Dózsa György út 57.
Telefono: 401-321

La varoj aĉeteblas:

Budapest XIII. Pozsonyi út 25.
Telefono: 127-688, 123-071

Al konstruigantoj kaj riparigantoj de loĝejoj por instali endomajn akvokondukilojn METALLOGLOBUS rekomendas premtubojn kaj kunligajn interorganojn el Poliviniklorido (PVC)

Por kunigi tubojn pere de interorganoj oni uzas gluaĵon, aŭ, por alfiksi ilin al la tradiciaj metaltuboj, oni uzas la tiucele kreitajn śraŭbumajn tubjuntilojn.

REVUO DE REVUOJ

LA ESPERO de certa tempo aperas grandparte svedlingve por akiri plian propagandan efikon; espereble la sveda movado sentas jam ties rezulton. Eĉ ĝia nova rubriko (samtitola kun ĉi tiu) legeblas foje en ambaŭ lingvoj pri interesaĵoj troveblaj en nia gazetaro. La tendencon – trovi novajn metodojn por movi pli da personoj – mi konsideras nepre prava kaj bonvena: eblas rimarki en la rubrikoj pli kaj pli da vigleco. Ŝajnas tre interesa certa avantaĝo de Eo, observita de la meritplena *Erik Carlén.* Liaj lastaj spertoj montris, ke Eo estas multe pli bone aŭskultebla – *eĉ per malbona aŭdkapablo* – ol paroloj en naciaj lingvoj konataj de li. Niaj vokaloj bone distingiĝas, helpas la regula akcentado, pro kio ĉiam plene aŭdeblas la vortofinoj kaj restas klaraj eĉ la vortospecoj. Do ankaŭ pro tiu trajto – skribas Carlén – Esperanto vere konvenas por sia destino, fariĝi mondlingvo. Se oni pensas pri lingvoj, kiuj „permesas gluti" al siaj parolantoj la finon de la vortoj, kaj tiel ofte tro malfaciligas al alilingvanoj la komprenon, oni devas konsideri grava tiun argumenton por nia afero (7-8.).

Granda grupo de esperantistoj protestis en Hago kontraŭ la frenezo de la atomarmiloj, meze de la aŭtune manifestacianta grandega popolamaso – raportis KOMUNA E-GAZETO (11.) kun pluraj tre imponaj fotoj. La manifestaciantoj montris E-slogantukojn pri Eo kaj la pacmovado, sed la brava grupo varbis por nia lingvo ankaŭ kun multaj faldfolioj. *Jacques Tuinder,* la fervora aganto en pluraj movadaj direktoj, kontraŭ la nukleaj amasmortigiloj faris grandiozan paroladon dum la Kongreso de KELI en Esztergom, antaŭ la UK. DIA REGNO (9.) prezentas tiun efikoplenan tekston: fortan alvokon por veki, kunigi ĉiujn fortojn de la homaro, de la kristanismo kontraŭ la vivdanĝero de la mondo, kune kun la hezitemaj ekleziaj gvidantoj, por elekti la vivon kontraŭ la morto kaj kontraŭi la intencan detruon de la homa ekzistado kaj la same detruajn sociajn maljustaĵojn. La kongreso – kiun partoprenis esperantistoj el 16 landoj – plenumis viglan programon en tiu pacvola spirito.

La landnomoj ofte estas diskutataj en nia movado, kaj ne eblas diri, ke kun tro da rezulto. La problemo estas foje troigita (iuj postulas ne-realan uniformigon), alifoje aperas la plej kuriozaj kaj disaj proponoj tiurilate. En PLANLINGVISTIKO (8.) kun kreskanta intereso mi legis mallongan eseon de *Giorgio Silfer* pri tiu temo, kaj ne pro ia nova eksperimenta propono. Ne, Silfer „nur" prudente kaj per sia konata erudicio *prilumis* la tutan aferon laŭ ĝia apero kaj evoluo en Eo. En tiu aspekto li prilumis la efektivan komplikecon – ne de la proponoj, sed de la reala stato, kiu bezonas aliajn metodojn en Eŭropo, kaj la ceteraj mondpartoj. Per individuaj proponoj, spiritaj ideetoj kaj lingvaj manieroj ne eblas fari solvon pro la diverseco de landoj, ŝtatoj, pro la malfacilo distingi gentojn kaj teritoriojn. Kio tre antaŭenigas la aferon, estas lia rimarko, ke fakte por Eŭropo, kun naŭdek procentoj de la esperantistaro, la Zamenhofa solvo bone taŭgas! Kaj naciaj lingvoj montras *multe pli kaosan* „sistemon" ol Eo!

En HORIZONTO DE SOVETA LITOVIO (6.) pri la sama temo daŭrigas detalan studon A. *Vaitilavičius,* en kiu li nun prefere analizas la konfuzan praktikon ne sekvantan la pretajn manierojn, kaj la diversajn projektojn. En tiuj troviĝas ja tro abunde kaosaj intencoj; vere kurioze, kiom da strangaĵoj prezentiĝas sur la skribotabloj! En tiu kajero cetere oni legu ankaŭ la animkaptan novelon „Odo al porko" de *M. Sluckis,* apud mallongaj originalaj poemoj de litovaj esperantistoj.

Klare aspektanta informilo de la esperantistaj *filatelistoj,* LA VERDA LUPEO entenas multe da novaĵoj. Ĝi mencias i.a. ke la nombro de la poŝtaj E-stampoj jam proksimiĝas al 900, depost la unua, kiu aperis en 1912 okaze de la 8a UK en Krakovo. Pri tiuj pasintjare eldoniĝis katalogo, kaj ekzistas eĉ tiucela speciala interŝanĝejo, „stampobanko". Multaj fotokopioj faras rigardinda tiun seriozan informilon, kiu abunde konigis la filateliaĵojn de la Hungara Poŝto, okaze de la Budapeŝta UK.

Se oni komencas per *erara koncepto,* la konkludo povas iĝi eĉ tute misa. Kiu ne spertis tion, farante propagandon por Eo? „Ne viva, artefarita, senanima, malkapabla lingvo", kaj tiel plu, ĝistede konata afero. Iom simile ekmeditis *Z. Tišljar* en la kroata TEMPO (83/3) pri niaj universalaj kongresoj, ĉar li konfuzas ilin kun (labor)konferencoj de sciencaj branĉoj kaj similaj (kiujn la organizantoj pro plia prestiĝo titolas, fojfoje same „kongreso".) Pro tiu konfuziĝo li trovas la niajn „strangaj kongresoj", kiuj apenaŭ „laboras", eble „nur la dekono" de la partoprenantoj. La „turismemuloj" ricevas de li malaltan klasifikon, same la diskutojn ĉeestantaj alparolantoj: „nekompetentuloj" ĉiaspecaj, grizaj mezkapabluloj tumultas antaŭ liaj okuloj, sin-montrantoj en solenaj vestaĵoj, kun la fiintenco foti sin kun gravuloj (mi povas do ĝoji, ĉar mi ne lasis foti min kun la grav/mien/a aŭtoro). Ekster la ne-esperantista medio oni facile agadas, ĉu ne, oni ja povas „kaŝi sin malantaŭ nekomprenata lingvo", tiel „nutri sian sinrespekton". *Sufiĉas, sufaĉas!* Ke niaj Kongresoj estas – krom la multe laborantaj kernoj – solenaj, grandiozaj renkontoj, por vivi dum semajno en Esperantujo, do ili havas plejparte *alian funkcion,* ol de li erare supozitan – tion la „kompetentulo" ne rimarkis ĝis nun, orgojle alrigardante la plebon de sur sia alta tribuno. Ne maleblas, ke lia partopreno *estis kiu savos la lastan* UK-on de la negativa prijuĝo far la historio...

Ervin *Fenyvesi*

S-ino Sándorné Csányi

Buĉistaj instalaĵoj de la Entrepreno MEZŐGÉP en Monor

La Maŝinfabrika Entrepreno en Monor por Agrikulturo kaj Nutraĵindustrio estas la plej granda maŝinfabrikanto por la hungara buĉ-industrio. Ĝi produktas vastan gamon de maŝinoj kaj instalaĵoj por buĉejoj kaj viandofabrikoj; ankaŭ kov-aparatojn por anserovoj, elektrajn movmekanismojn, hidraŭlajn pumpilojn kaj cilindrojn.

La Ĉefagenturo de MEZŐGÉP (Budapeŝto, Pesti út 5-7. H-1173, tel.: 270-873) akceptas mendojn pri projektado kaj instalo de kompletaj buĉejoj, maŝinserioj-linioj por bovoj, porkoj, ŝafoj, kokoj, k.s., viandopreparejoj, fridejoj – pri rekonstruado de malnovaj uzinoj inkluzive projektadon – pri kompleta teknologia projektado kaj plenumado de vilaĝaj, simplaj kooperativaj buĉejoj.

En la industrio multloke estas uzeblaj niaj pend-transportiloj:

MH-600 tipaj transport-instalaĵoj

Por higiene movi aĵojn en la nutraĵindustrio, precipe en buĉejoj kaj viandofabrikoj, bone servas la unu-, respektive du-relaj transport-instalaĵoj.

Leviloj metas la ŝarĝon supren al la pend-transportilo, same remetas ĝin; ĉen-mekanismo (permane aŭ mekanike movebla) pluigas la ŝarĝojn sur la pend-relo, kies ŝarĝeblon garantias la mezpeza, respektive la peza tipoj. Se oni kunigas plurajn tiajn transportilojn, ilian akuratan akordigon plenumas sinkroniga aparato.

Ebenaj pend-reloj

a/ La MPL-tipa ŝtallata pend-transportilo havas relprofilon de 60x12 mm.

Ŝarĝeblo:

mezpeza tipo	500 kaj 700 daN/m
peza tipo	700 kaj 1000 daN/m

b/ MPC-tipa tub-transportilo, kun diametro/profilo de 60 mm.

Ŝarĝeblo:

mezpeza tipo	300 kaj 600 daN/m
peza tipo	600 kaj 1000 daN/m

Plurdimensiaj unutrakaj transportiloj

a/ KE-tipa, tirĉeno kun ŝarĝitaj ĉaretoj, kondukataj sur trako kaj gvidradoj.

Mezpeza tipo:	maks. tirforto	1600 daN
	maks. ŝarĝeblo	300 daN/m
	rapido	0,3–20 m/min

b/ NE-tipa, tirĉeno kun ŝarĝitaj ĉaretoj, kiel supre.

Peza tipo:	maks. tirforto	1600 daN
	maks. ŝarĝeblo	500 daN/m
	rapido	0,3–20 m/min

Plurdimensiaj du-trakaj transportiloj

a/ KKL-tipa, mezpeza, du-traka transportilo.

Teknika akordigita kunigo de la KE-tipa, transportilo kaj MPL pend-transportilo:

maks. tirforto	1600 daN
maks. ŝarĝeblo	700 daN/m
rapido	0,3–20 m/min

b/ KKC-tipa, mezpeza, du-traka transportilo.

Teknike akordigita kunigo de la KE-transportilo kaj MPC-pend-transportilo:

maks. tirforto	1600 daN
maks. ŝarĝeblo	600 daN/m
rapido	0,3–20 m/min

c/ NKL-tipa peza, du-traka transportilo.

Sistemo kunigita el la pezaj NE-transportilo kaj MPL-pendtransportilo:

maks. tirforto	1600 daN
maks. ŝarĝeblo	1000 daN/m
rapido	0,3–20 m/min

MB-500-2 tipa pend-transportilo por kortbirdo-prilaborejoj

Nemalhavebla instalaĵo dum prilaborado de kortbirdoj, ĉar ĝi plenumas ĉiujn transportadojn necesajn. Ĝi funkcias tute aŭtomate, sekure, kun speciala sinkronigilo por la adaptitaj moviloj, ne bezonas multe da prizorgado. La T-profilo de la relo ebligas perpendikle ŝarĝi la portantajn rul-pecojn, minimumigante ties defrotiĝon kaj difektiĝon. Tiujn portantajn rul-pecojn interligas plastokovrita ŝtala tirkablo, sekve ili iras tre elaste, silente kaj sendifekte.

Kapablo	12 000 kokidoj/horo
Instalita elektra povo	2,5 kW/100 m
Maso	14 kg/m

La Entrepreno MEZŐGÉP en Monor liveras por siaj pend-transportiloj ankaŭ subtenilojn, krome ĉiajn kompletigajn kaj akcesorajn ekipaĵojn – inter ili, kun ĉiaj ajn pendigiloj ekipitajn rullagrajn kaj glitŝuajn pend-ĉaretojn aŭ port-tasojn.

Ĉiuj partoj de la instalaĵoj estas el neoksidebla ŝtalo, aluminio, aŭ korodorezista, zinkizita metalo.

Maŝinfabrika Entrepreno en Monor

por Agrikultura kaj Nutraĵindustrio

Komerca Direkcio

Monor, Gép u.1. H-2201, Pf. 13.

Telefono: Monor 77. Telekso: 224 293

De kabloj ĝis akumulatoroj

Iom pri la Fabriko de Plastoj kaj Elektro-izolaĵoj

Ĝuste antaŭ 100 jaroj oni fondis la kernon de la nuna entrepreno: la eta firmo Perci kaj Schacherer post rapida evoluo, komence de nia jarcento, jam iĝis akcia societo, laŭnome Kablofabriko A.S. La nunan formon kaj nomon ĝi ricevis en 1964 post la aliĝo de pluraj etaj uzinoj.

Originale oni fabrikis tie elektrajn konduktilojn kaj kablojn; post 1922 aldoniĝis aliaj artikloj por elektromuntado, inter aliaj izol-tuboj kaj multaj specoj de akcesoraĵoj.

En 1929 la fabriko jam prilaboris – la unua en la lando – termoplastojn varme-solidiĝantajn. Tiu agado pli kaj pli ampleksiĝis: oni ekuzis multajn plasto-specojn, sekve ankaŭ diversajn teknologiojn. Aliflanke malpliiĝis la produktado de kabloj, sed kompense la entrepreno disvolvis la fabrikadon de diversaj frotantaj materialoj. Tiel la produktado atingis la tutan gamon de la plastaĵoj. La teknika nivelo de ilia prilaboro iĝis modelo por la disvolvo de la enlanda plasto-industrio.

Tamen la tro vasta sortimento de produktaĵoj iĝis poste obstaklo de la harmonia evoluo de la entrepreno. Pro tio oni fordonis tutan uzinon (en Sashalom), kaj pro tio malkreskis la produkto de bazmaterialoj, poste oni eĉ ĉesis fabriki gramofondiskojn kaj kablojn.

Post konvena selektado el la produktaĵoj, nun la entrepreno okupiĝas pri produktado de altnivelaj plastaĵoj, duon- kaj finproduktaĵoj, provizante per ili la enlandajn industriojn de veturiloj, mebloj, nutraĵoj kaj konstruado.

Por la entreprena centro restis la tasko direkti la laboron de tri fabrikoj, kiuj havas cetere grandan aŭtonomion. La centra sidejo troviĝas en Budapeŝto (XI. Fehérvári ut 120.), kie jam depost 1901 laboris la Kablofabriko. Tie ĉi estas ankaŭ nun la plej granda hungara fabriko de plastoprilaboraj iloj, same ties projekta sekcio.

La fabriko en *Kiskunfélegyháza* disvolviĝis – el malgranda komunuma uzino – je granda, moderna fabriko kun proksimume mil laboruloj. Ĝi fieras pri la plej granda Hungarlanda prilaborejo de varme-solidiĝantaj plastoj.

La entrepreno fondis en 1973 en *Kisvárda* – tiam urbo ankoraŭ sen industrio – novan fabrikon, produkti tegaĵojn por bremsoŝuoj kaj kupliloj de aksoj. Tiucele la sola enlanda fabriko, ĝi okupas jam pli ol 500 laborulojn.

La KONTRAKTEN^{R}-tuboj varme-ŝrumpantaj, estas produktataj el stereoreta modifita polietileno en maldikvanda, duonrigida, bruligebla kaj memestinga tipoj, kiuj interne estas tegeblaj per lik-imuniga gluaĵo.

La flekseblaj kaj duonrigidaj tipoj estas uzeblaj precipe kiel elektraj izol-materialoj por malgrandtensiaj aparatoj kaj iloj de la industrio de elektroniko, komuniktekniko kaj instrumentoj. La fleksebla tipo restas tia eĉ post la ŝrumpado de la

pecoj. La duonrigidaj tuboj forte ŝirmas kontraŭ ajnaj elektraj, mekanikaj kaj kemiaj efikoj.

La tipoj kun meza aŭ granda diko estas bone uzeblaj kiel izolaj materialoj por kablo-interligoj kaj finfermiloj ĉe tensioj de 0,6-1 kV, en interna loko ĉe 6-10 kV.

La tipoj interne lik-imunigitaj per gluaĵo krom izoligo bone aplikeblas por intense kaj sekure ŝirmi kontraŭ akvo, korodo kaj aliaj kemiaj efikoj (ekz. ĉe tubo-interligoj kaj veldjuntoj).

La fabriko liveras la ŝrumpemajn tubojn en la originalaj dimensioj. La ŝrumpo – ĝis 25-50% de la originala diametro – okazas per alblovo de varma aero (almenaŭ 120 °C) aŭ per flamo nek pika, nek fulganta. La mendeblaj dimensioj – depende de la tipo – estas inter O 2,4/1,1 kaj 110/37 mm.

CAROFLEX BREMSO-TEGAĴOJ

Frotantajn bremso-tegaĵojn por bremsoŝuoj fabrikas enlande pleje nia fabriko n-ro 3 en *Kisvárda.* En ĝia sortimento troviĝas ĉiuj bremso-tegaĵoj kaj enmetaĵoj uzataj ĉe personaŭtoj kaj strataj veturiloj por diskaj kaj cilindraj bremsoj kaj kupliloj. Ilin oni uzas ankaŭ en aliaj industrio-brancoj. Tiuj varoj havas la fabrikmarkon CAROFLEX^{R}.

Laŭprograme estas modernigataj niaj bremso-tegaĵoj por pezaj aŭto-veturiloj. Tiucele ni aĉetis licencon pri tambura bremso-tegaĵo de la DON International Ltd.

AKUMULATOR-KESTOJ

Niaj laŭkutimaj durkaŭĉukaj kaj modernaj polipropilenaj akumulator-kestoj estas uzataj ĉe produktado de acidaj baterioj por startigiloj, elektraj ĉaroj kaj diversaj aliaj industriaj celoj.

La uzo de modernaj, kontraŭ frosto, varmego kaj frapo rezistaj plastoj, ĉe startigaj akumulatoroj (ĝis 12 V kaj 140 Ah) ebligas interligi la opajn baterio-polusojn sub la acidnivelo. Tio signifas malpli da plumbo kaj pezo, tamen plian startpovumon, krome aŭtomatizeblan muntadon.

Parton de niaj plastaj kestoj ni povas liveri – krom la serie fabrikata veldita kovrilklapo – ankaŭ alternative, per gluebla kovrilo, por duonaŭtomatizita muntado de malgrandaj serioj.

Tradukis: *E.F.*



ORIGINALA POEZIO

Aldo de' Giorgi

La Reĝo

En l' animala mond' felisoj reĝas
– sciatas tio –
(la hom' sin kredas tia sed dubindas).
En la eskal' bestara, jes, surpintas
li,
l' unika, la despota, la sultana,
trompema, riproĉinda, detruema,
perfida kaj sendanka,
aminda, rave sorĉa, ŝategata.
En hejmoj li dominas
kaj en la koroj homaj.

Liber' 'stas lia flago kaj principo.
Nin regas li,
kvankam ni mastroj nomas nin.
Liaj kapricoj en servuto
nin tenas kaj sklavigas
(samon de samspecianoj ni ne tolerus),
kaj per dorlotoj kaj frandaĵoj
liajn provokojn reciprokas ni.

Kial do ni lin amas?
Mistero! Tamen
plej ĉarma estas li inter estaĵoj.

Liaj okuloj
mildon kaj amon ne esprimas
sed fieron, sagacon, ruzon
(reĝoj de l' nokto, kiel lumturoj etaj,
flave sparkantaj kiel lazer-radioj.)
Eta lanbulko, silkeca kaj velura,
ludema kiom sufiĉas,
kiam necesas,
senzorge agresa, vundopreta,
kiam liber' kaj memdecid' dangeras.

Ronrono delikata,
kiam karesoj lulas.
Miaŭo dolĉsone rava,
kiam furaĝdeziro puŝas
sed, foje, humane hurla,
agace trapenetra, kiam
uverturo al la sovaĝ' amora.

En etaj piedopufoj
ungetoj tranĉaj ĉiam pretas,
tamen
en la hejmbesta mondo
li estas mato,
li, reĝo, imperiestro, diktatoro,
li, nia kato.

* * *

Zora Heide

Eĉ aĵoj amas pacon

En burĝonplena ĝardeno de l' eksa fervojisto
fieras maljuna vaporlokomotivo pri siaj gloraj tagoj
kiam vaporo siblis laŭ la kosmaj vojoj
la vasta ŝtalfaŭko abundis je ofta karba festeno
kaj la lokomotivestro en karbenigra kitelo
polure karesis la glatan ŝelon de sia belulino

Kaj nun en la tempo moderna direktas lokomotivestroj
tiel nomatajn monstrojn kun dizel-elektraj motoroj
la suno ne plu estas ilia sola mastro
flamaj raketoj flugas super la fervojaj strioj
dum la universo ĝemas sub bomboj kaj pafiloj

En kolorplena ĝardeno de l' eksa fervojisto
kvietan vivon ĝuas maljuna vaporlokomotivo
simile al grafino respektoplene flegata
kaj ne kiel ferruba monstro fetita apud kanalo

Ĉirkaŭ fera koloso petolas kavaliro oni ĝin nomas zefiro
ĝi rozojn amindumas kaj fajfas por lilioj
tie kie regas la paco kaj frata harmonio
diskutas maljuna maŝino kun sia estra sinjoro
pri longaj rellinioj pri tempo forpasinta
kaj preĝe la Eternulon petas el fermuskola koro:
kompatu mizerulojn, ho Dio ĉiopova
ĉar ili ne konscias siajn malbonajn farojn.

La poezia mondo de la Esperantaj poetinoj

Kiel en ĉiuj naciaj literaturoj, ankaŭ en la Esperanta literaturo unue aperis la poezio, kiu dum apenaŭ unu jarcento atingis la nivelon de la naciaj poezioj.

Kiam ni analizas la originalan Esperantan poezion, ni ordinare sekvas ĝian historian evoluon kaj ĝis nun ni provis vicigi la Esperantajn poetojn laŭ epokoj kaj skoloj, sed niaj poetoj ofte ligiĝas unu al la alia ankaŭ kun siaj mondkonceptoj, kun la problemoj, kiujn ili lanĉas en siaj verkoj. Tial la kreado de la poetoj, kiuj apartenas al diversaj epokoj aŭ skoloj, ofte estas proksime unu al alia, aŭ nevole influas unu la alian. El tiu ĉi vidpunkto ni povas klare difini la rolon kaj lokon de la plej elstaraj poetinoj en nia poezio.

En la unua epoko de la Esperanta poezio inter 1887-1919, kiun epokon Auld difinas kiel „Primitiva Romantismo", en nia poezio mankas elstara poetino, malgraŭ ke inter la jaroj 1908 kaj 1919 aperis multaj poemkolektoj.

En tiu ĉi periodo verkis la rusino Maria Stanislavovna *Tenner,* en kies poemoj senteblas delikata artismo, sed bedaŭrinde Tenner ne sukcesis disvolvi sian talenton.

En 1911 aperis la poemkolekto de la germanino Marie *Hankel* „Sableroj", tamen Hankel ne tre bone regas la versan formon, kaj ŝiaj poemoj tedas per ĝeneralaj emociaj konceptoj.

Post la Unua Mondmilito, kiam en Budapeŝto Vilmos *Bleier* fondis la unikan eldonejon „Literatura Mondo", kaj kiam ekfloris la talentoj de *Kalocsay* kaj *Baghy,* nia poezio eniris sian duan epokon „Polurita Romantismo" (1919-1939), kiu epoko karakteriziĝas per forta ondo de junaj promesplenaj poetoj.

Multaj el ili debutis sur la paĝoj de „Literatura Mondo", kaj en 1934 sub la redakto de Kalocsay aperis la originala poezia antologio „Dekdu poetoj", per kiu antologio kune kun *Adamson, Price-Heywood, Hovorka, Kurzens, Maŭra, Newell, Schauhuber, Stillman, Szilágyi, Tárkony,* en nian poezion eniris ankaŭ du poetinoj: la hispanino Amalia *Núnez Dubús* kaj la estonino Hilda *Dresen.*

Amalia Núnez Dubús posedis originalan poetan voĉon. Kelkaj ŝiaj poemoj ankoraŭ nun sonas aktuale kaj ne hazarde ŝiaj tri poemoj trovis lokon ankaŭ en la „Esperanta Antologio" (1958), redaktita de Auld, sed bedaŭrinde ŝi iom post iom eksilentis.

El la poetoj, kiuj debutis en „Dekdu poetoj", nur Tárkony kaj Hilda Dresen restis fidelaj al la originala Esperanto-poezio.

Kaj nun, kiam ni analizas la kreadon de la Esperantaj poetinoj, ni povas tute firme aserti, ke Hilda Dresen estis nia unua Esperanto-poetino. Unua ne pro la fakto, ke ŝia talento vicigas ŝin inter la plej elstaraj poetoj en nia poezio, sed pro la fakto, ke Hilda Dresen la unua riĉigis la Esperantan poezion per tipe virinecaj tonoj, motivoj, emocioj.

Jam en siaj unuaj poemoj Hilda Dresen trovis sian originalan poezian voĉon, al kiu ŝi restis fidela ĝis la fino de sia vivo. Specifa ina tenereco kaj lirikeco karakterizas la kreadon de Hilda Dresen. En ŝiaj poemoj ni sentas nuancojn, kiuj delikate aludas pri la nevideblaj tremoj de la ina animo. Tio povas esti sopiro dolora kiu „ekvibras en koro sekreta", „la beltaliaj junulinoj, rave ekflorantaj" aŭ:

De ie vibras kuprosone
plendo sonorila
ekfloras en la kor' burĝone
unu rev' sopira –

(Aŭtuna krepusko)

Tiuj bildaj poeziaj aludoj donas al ŝia liriko apartan ĉarmon.

Hilda Dresen kvazaŭ hezitas malkovri sian inan koron aŭ enrigardi en la sekretojn de la ina animo, kaj malgraŭ ke en la poemo „Tenero" ŝi deklaras ke:

Senverva ja estas
la am' sen pasio
ĉi tio atestas
pri am-iluzio.

La amsento en ŝiaj poemoj estas nur kiel „rev' sopira" aŭ kiel blovo de printempa vento. La pasioj kaj konfliktoj de la ina animo ne allogas Hilda Dresen, kaj en ŝia poezio regas trankvilo kaj harmonio.

Ŝia poezia rigardo estas direktita ekskluzive al la ekstera reala mondo, kiu mondo inspiras ŝin per sia eterna harmonio. Kiam ni legas la poemojn de Hilda Dresen, ni havas la senton, ke ŝi plej bone sentas sin nur ekstere, sub la vasta blua ĉielo, inter la florantaj arboj, aŭ sur la longa neĝa vojo... Eble tial, konstantaj elementoj de ŝia poezio estas la ĉielo, la neĝo, la arboj kaj kvazaŭ la kvar fundamentaj substancoj: aero, fajro, akvo kaj tero, formas ŝian poezian mondon:

Verdas la tero kaj bluas la mar' kaj ĉielo,
koron sopire ŝveligas blankanta ŝipvelo.

(Printempe)

Malgraŭ ke en la poemoj de Hilda Dresen regas la kvieto kaj trankvilo, en ili ni ofte rimarkas ankaŭ la moviĝon, kiu esprimas la jubilon de la vivo kaj la optimismon de la poetino:

Kirlante neĝon furioze
sur ebenaj' galopas vent',
ĝi flugas, flugas senripoze
ne haltas ĝi eĉ por moment'.

...ĝi volas, ke la hom' sin hardu
kaj ŝtorme fluu lia sang'.

(Vento)

Aŭ kiel tio estas esprimita en la poemo „Printempiĝo":

Vento skuadas pordegojn kaj klakas
kiel bubaĉ' per fenestrokovriloj,
homojn surstrate angore atakas,
ŝiras el kap' de virinoj kaj viroj
pensojn mucidajn, sin ĉien enŝovas,
vintran humoron senreste forblovas.

Ordinare por la poetinoj estas karakteriza la bilda pensmaniero, kaj ni vidas, ke ankaŭ Hilda Dresen estas ege sentema al la konkretaj detaloj, kaj pere de ili ŝi spertas krei originalajn metaforojn kiuj elvokas vastajn asociaciojn.

En Aŭtun' la arboj kiel damoj
portas robojn pompajn silksusurajn
kaj paradas ŝike per ornamoj
kupraj, bronzaj, oraj kaj purpuraj.

(Arboj)

Malgraŭ ke la temoj en la poezio de Hilda Dresen ne

estas tre variaj kaj la spektro de ŝiaj sentoj ne estas tre vasta, Hilda Dresen sukcesis montri la lirikecon kaj teneran emocion de la ina animo, la inan delikatecon, la ĝojon de la vivo kaj la sinceran admiron antaŭ la beleco kaj harmonio de la naturo.

De Hilda Dresen aperis nur unu originala poemkolekto „Norda Naturo" (1967), sed tiu ĉi modesta poemaro certigis ŝian lokon en la Esperanta poezio.

Post la Dua Mondmilito nia poezio eniris novan epokon „Metafiziko" (1945-) kaj novaj poetinaj voĉoj eksonis en la Esperanta poezio.

En 1955 aperis la poemkolekto de Marjorie *Boulton:* „Kontralte", kaj per tiu ĉi poemkolekto en nia poezio debutis tre originala kaj individua poetino.

Se en la poezia mondo de Hilda Dresen regas la harmonio, en tiu de Boulton regas la konfliktoj. Se H. Dresen direktas sian rigardon al la ekstera mondo, Boulton rigardas en sin mem, se Dresen evitas mediti pri la pensoj kaj sentoj de ina animo, Boulton detale, profunde analizas ilin.

Boulton obstine serĉas respondon al la eterna demandoj: „Kiu mi estas? ", „Kial mi vivas? " kaj la celo de la poetino estas, kiel trafe ŝi mem diras:

min de mi senvesti.

En la tre konata poemo „Aliĝilo" Boulton ege bilde kaj metafore respondas al la demandoj kiuj konstante kaj senĉese okupas ŝiajn pensojn. Ŝi deklaras, ke antaŭ ĉio ŝi estas homo kaj esti homo – tio signifas multe pli ol la fakto al kiu nacio oni apartenas. Ŝia religio estas „amo, kreo, vero kaj akceptita devo de espero". Tiun „religion" ŝi konstante kaj obstine sekvas per siaj poemoj. Ne laste ŝi estas virino aŭ kiel mem ŝi deklaras „virino vira, ina viro" kaj per siaj poemoj ŝi strebas deĉifri la virinan psikon, ĉar kiel ŝi emfazas en „Amaraj sonetoj":

Komplika estas psiko de virino.

Tiun ĉi motivon Boulton tre bone esprimas ankaŭ en la poemo „La triopa memo". „Kiu mi estas? " demandas la poetino; ĉu la „digna lektorino", aŭ „virino simpla en dezir' tortura", aŭ la poetino. Ŝi estas ankaŭ la lektorino, ankaŭ la virino, ankaŭ la poetino, ĉar ŝi bone konscias, ke sen iu el tiuj tri memoj, ŝi ne estos ŝi.

Alia granda demando en la poezio de Boulton estas la demando „Esti aŭ ne esti", „Vivi aŭ ne vivi". La poetino kvazaŭ konstante demandas sin, ĉu indas vivi, ĉu ne estus pli bone reveni en la „uteron varman kaj komfortan" aŭ denove iĝi embrio, liberiĝi de ĉiuj zorgoj de la vivo:

Laborkontraktoj kaj diplomoj,
ŝlosiloj, ĉekolibroj...

(Retro)

En tiu ĉi decida, eĉ kolora krio, ni sentas la jarcentan virinan volon esti libera, vivi liberan sangobolan vivon kaj mem majstri sian vivon.

Se Dresen sentas sin ido de la naturo, kiu per larĝe malfermitaj okuloj ĝuas la vivon kaj la harmonion de la naturo, Boulton sentas sin individuo kiu devas batali ne nur por realigi sian memon, sed ankaŭ kontraŭ la hipokriteco kaj la filistraj moroj. En la „Trista tenereco" Boulton sarkasme kontraŭstarigas al la:

Unua amo, simpla, vibra, klara

la filistran moralon de la socio:

Publika ĉambro por la junaj paroj...
Malpermesita estas la privata...
Prude kaj ĉaste ilin mi konsolas,
ĉar tie ĉi malbelas belaj faroj:
kion mi dirus en sincer' senflata
en malsimila mondo – malsimilas.

Hilda Dresen parolas pri la amo hezite, tenere. Por ŝi la amo estas delikata, benita sento. Dresen ne konas la konflikton inter la karno kaj animo, sed ĉe Boulton tiu ĉi konflikto estas tre forte esprimita kaj tiun ĉi konflikton ŝi ege bilde interpretas en la poemo „La karna ĉevalo":

Duone mi dresadas la ĉevalon,
mian sovaĝan karnon. Mi sukcesas,
per birdo, volo, vipo, mi ĝin dresas,
ĝi konas mian voĉon kaj signalon.

Sed Boulton bone konas la virinan koron, kaj tiun koron, en kiu bolas la pasio, oni ne povas dresi:

Sed unu nokta bruo ĝin torturas:
ĝi tremas, ree sentas sin sovaĝa
kiam sub pala lum' kruelvizaĝa
liberaj hufoj sur la step' tamburas.

Boulton kolorigas la intiman senton per la farboj de sia intelekto. Ŝi vastigis la temojn kaj problemojn en nia poezio. Ŝia poezio eksonis ne nur intime, sed ankaŭ filozofie. En la poemoj ŝi talente interpretis la eternajn homajn problemojn.

Hilda Dresen kaj Marjorie Boulton el diversaj vidpunktoj, tra diversaj prismoj montris la kaŝitajn angulojn de la ina animo. Se Hilda Dresen montris la tenerecon kaj lirikecon de la virina animo, Boulton montris la eternan emon de la homo ekkoni unue sin mem. Boulton estas nia unua poetino kiu en siaj poemoj sincere, detale meditas pri la amo, pri la sorto de la virino.

En la sesdekaj jaroj, en nia originala poezio debutis ankoraŭ unu atentinda poetino – Eli *Urbanová.* En 1960 „Stafeto" eldonis ŝian unuan poemaron „Nur tri koloroj" kaj en 1981 aperis ŝia dua poemaro „El subaj fontoj".

Simile al Dresen ankaŭ Urbanová bilde perceptas la realan mondon kaj simile al Boulton ankaŭ Urbanová enpenetras en la sekretojn de la ina animo, sed kompreneble tiu ĉi komparo relativas, ĉar laŭ sia poetika mondpercepto Urbanová estas nek Dresen, nek Boulton, sed tute individua voĉo en nia poezio.

Ankaŭ Urbanová strebas antaŭ ĉio ekkoni sin mem, esplori la tremojn de sia ina animo.

Aŭ mi por la ekkono
penetris en la teron,
en kies profundego
perdiĝis mia vojo?

(Abismo de ekkono)

Unu el la ĉefaj motivoj en la poezio de Urbanová estas la amo. Urbanová detale esploras ĉiujn nuancojn de la amo kaj ankaŭ ŝi serĉas respondon de la eterna demando „Kio estas la amo? ". Sed se por Boulton la amo estas:

...nia vera iluzio
kiu kondukas nin al vero vera!

(Alvoko al Amo)

por Urbanová la amo estas „ardo", „flamo", „peza vino" kaj ŝi pli tere, pli emocie, eĉ ni povas diri iom erotike interpretas la aman senton.

Estas interese kompari du poemojn de Urbanová kaj Boulton, kiuj poemoj havas preskaŭ unu saman temon:

En sonĝo nur
ni pekas sen pudoro
regataj de pasi',
en sonĝo nur
mi tra feliĉa ploro
diradas al vi: ci!

(E. Urbanová: En sonĝo nur...)

La menso subkonscia, lerta
faris amuzan kompromison,
kiam mi dormis, nur inerta,
via sonĝombro donis kison –

... kaj dum la tago mi ekstazis
pri tio, pri miela penso
de kiso kiu ne okazis,
kiso el mia propra menso.

(M. Boulton: Kiam vi kisis min)

Por ambaŭ poetinoj la sento estas la sama; por Urbanová „feliĉa ploro", por Boulton – ekstazo, sed ĉe Urbanová la sento estas rego de pasio, ĉe Boulton ĝi estas nur „miela penso".

La lirika figuro en la poemoj de Urbanová akceptas ĉiujn riskojn de la amo, kiu estas ne nur „feliĉa ploro", sed ankaŭ doloro, turmento kaj tion Urbanová tre talente interpretas en la poemo „Sorĉistino". En tiu ĉi poemo, uzante fabelan motivon, la poetino montras la kontraston de la ina peko kaj senkulpeco:

Mi vendis min.... Je kia prezo?
Por fulmmomento de ekstaz'.

... Ĉu iu – tiel min karesis?
Ĉu iu kisis – kiel li?
Sub tur-men-ti-loj mi konfe-sis
la tu-tan verrr-on kaj eĉ – pli...

Ankaŭ Urbanová protestas kontraŭ la hipokriteco, kontraŭ la filistra moralo, sed ŝia protesto estas pli pasia, kaj ne sarkasmon, kiel en la poemoj de Boulton, sed profundan doloron kaj indignon ni sentas en ĝi:

Ĝis nun ne vidis tian nudon
urbo escepte ekscitita.
Do distru vin! Do pruvu prudon
per kruco hipokrita!

(Sorĉistino)

Unu el la interesaj motivoj, kiujn ni rimarkas en la poezio de Urbanová, estas la motivo pri la familia vivo kaj la amo. La familia vivo fariĝas malliberejo de la amo, Urbanová protestas kontraŭ la filistra familia vivo, kiu mortigas la sentojn kaj la amon, kaj en kiu la edzino sentas sin posedaĵo de la edzo:

Nur kiam ŝi sur lito kuŝas
kaj suverene li ektuŝas
dum ama akto sen ekstazo,
en ŝi eksplodas muta ploro.

(Malvarma edzino)

La saman ideon esprimis ankaŭ la svedino Magda *Carlsson,* sed ŝi estis pli direkta kaj ne sukcesis atingi la poezian sugeston de Urbanová:

En ĉiutaga ted' acidi.
Ĉe la radiofono triste fridi.
Rutinkoiti.

(M. Carlsson: Rimekzerco pri malnova temo)

Se en la poezio de Hilda Dresen la neĝo, la ĉielo, la florantaj arboj ludas rolon de poeziaj simboloj, en la poezio de Urbanová poeziaj simboloj iĝas ĉiutagaj objektoj: la ringo, la vazo, la jako, la tuko. Al tiuj ĉiutagaj objektoj Urbanová spertas doni simbolan signifon, kaj pere de ili ŝi majstre esprimas siajn intimajn sentojn, ekzemple la ringo en la poemo „Ringo" simbolas la iaman amon, la plena vazo de salikfloroj el la poemo „Pri unu printempo" iĝas simbolo de la „juneco, rido, belo" aŭ la tuko el la poemo „Tuko" aludas pri la amoĝojo.

Verda tuko apartenas
al trezoro de mi, riĉa.
Foje estis mi feliĉa,
amata ––

Kompare kun Dresen, la poezia mondo de Urbanová estas pli reala, kaj, kiel Dresen, ankaŭ Urbanová preferas observi al mediti. Kompare kun Boulton, Urbanová ne posedas la figuroriĉan filozofiemon de Boulton, sed en nia originala poezio Urbanová estas tute suverena kreanto kun intima, melodia, iom erotika poetika mondo.

En nia ankoraŭ juna originala poezio eksonis ne malmultaj poetinaj voĉoj, ni povas mencii ankaŭ la nomojn de la latvino Ljudmila *Jevsejeva,* de la svedino Elsa *Nyberg,* de la ĉeĥino Eva *Seemannová-Suchardová,* de la italinoj Clelia *Conterno-Guglielminetti* kaj Lina *Gabrielli,* sed iuj el ili, sendube ankaŭ talentaj, ne povis eldoni memstarajn poemkolektojn, aliaj iom post iom eksilentis, kaj iuj ne sukcesis plene disvolvi sian talenton. Nur Dresen, Boulton kaj Urbanová restis ne nur fidelaj al la originala Esperanta poezio, sed per siaj poemoj ili sukcesis subtile montri la tenerecon, la sopirojn, la konfliktojn, la pasiojn de la ina animo, kaj tiamaniere ili riĉigis nian originalan poezion per novaj temoj, sentoj, motivoj.

Georgi *Mihalkov*

●●

Marjorie Boulton

Al la edzino de mia amato

Mi amas vin, ĉar lin vi vere amas,
kaj brodas ore, geme, milkolore,
la amon, kiun mi nur diagramas.

Vi konas liajn mankojn, sed adore
karesas, trankviligas, flegas lin,
al li rilatas sune kaj sunflore.

Vi estas mia vera amikin';
vi amas lin; vi igas lin feliĉa;
ho, daùru tiel ĝis la vivofin'!

En via amo sankte senkondiĉa
vi faras pli ol mi kapablus fari
por li, ho nobla koro sindediĉa!

Kaj via amo devas min forbari
de li; kaj tion mi akceptas plene;
al mia Kara mi ne rajtas kari.

Sed vidu min kompate kaj komprene;
ho malavara koro, min ekskuzu;
ĉe li vi nepre tronas suverene;

ne timu mian amon; ne jaluzu;
vi feliĉigas lin; kaj mi – mi scias.
Feliĉa restu li; feliĉon uzu.

Ne timu min, ĉar kvankam mi pasias,
sur ŝtormoj krucumita kvazaù kajto –
mi nur pri amo mem apelacias –.

Sufero, elementa Homa Rajto.

INTERKONSENTO
pri kunlaboro de Hungara Naturamika Asocio kaj Hungara Esperanto-Asocio

La Hungara Naturamika Asocio (HNA) kaj HEA deziras, ke rekomenciĝu la iama bona kunlaboro inter naturamikoj kaj esperantistoj. Pro tio la estraroj de ambaŭ Asocioj interkonsentis pri la sekvaj:

1./ HNA siaflanke akceptas, ke ĝi

– subtenos la popularigon de la E-movado en la gazetaro, radio, televido, k.s.,
– prezentos eblojn en la naturamika instruado kaj pluedukado por informi pri la celoj de la Esperanto-movado kaj varbi por ĝi,
– informos la naturamikajn grupojn kaj societojn pri aranĝoj de esperantistoj,
– ebligos partoprenon de esperantistoj en kursoj kaj ekzamenoj por gvidistoj,
– subtenos publikigon de eldonaĵoj pri migrado en Esperanto,
– invitos la reprezentantojn de HEA al siaj aranĝoj.

2./ HEA siavice akceptas, ke ĝi

– popularigos la migradon en siaj E-lingvaj kaj hungaraj revuoj,
– donos informojn pri siaj aranĝoj, pri tiuj de la internacia E-movado, ankaŭ per regula alsendo de «Monda Turismo»,
– kunlaboras en la kreado de la eksterlandaj kontaktoj de la naturamikaj organizaĵoj,

Turista hotelo en Bakonybél (Foto de Z. Fejér)



– organizos prelegojn pri la E-movado kaj pri la internacia turismo,
– ebligos 50 procentan rabaton al membroj de HNA en Esperantaj lingvokursoj,
– varbos esperantistojn por partopreni ekskursojn kaj tendarojn de la naturamikaj organizaĵoj.

3./ HNA kaj HEA komune akceptas, ke ili

– akordigos siajn agadojn kaj instigos la regionajn kaj lokajn organojn de naturamikoj kaj esperantistoj por krei inter si konvenajn kontaktojn kaj disvolvi ilin,
– regule analizos la plenumon de tiu ĉi interkonsento kaj ĉiujare pritraktos ĝin.

d-ro Géza Lőrinczi — *ĝen. sekretario de Hungara Naturamika Asocio*

d-ro Endre Baráth — *ĝen. sekretario de Hungara Esperanto-Asocio*

Ekskursi eblas en ĉiuj aĝoj (Foto de Z. Fejér)

PAĜO DE KOMENCANTOJ

*Tre bone niaj legantoj jam konas la verkon „Amuzaj dialogoj" de Albert Lienhardt. La elstara franca pedagogo nun aperas kun nova brila verko antaŭ la publiko: „**Amuza legolibro en Esperanto**". Tiu ĉi libro enhavas 100 amuzajn historiojn, kiujn sekvas po 10 didaktikaj demandoj kaj respondoj, kaj tiamaniere ĝi estas elstare uzebla en progresigaj kursoj, sed ĝi estas tre taŭga ankaŭ por memlernado. La ilustrafojn desegnis la konata hungara karikaturisto István Endrődi. Jen ĉi-sube kelkaj el la cent historietoj, kiuj certe vekos apetiton por la valora libro, mendebla ĉe Hungara Esperanto-Asocio.*

1. Kio estas porkido?

Alekso estas *kvar*-jara *knabo*. Li *ludis* en la *korto*, kaj li estis *tre* malpura.

La *patro* de Alekso diris al li: «Mia filo! Vi estas *porkido*. Ĉu vi scias, *kio* ĝi estas? »

«Jes», respondis Alekso. «*Porkido* estas la *filo* de *porko*.»

19. La botelo estu ĉiam bone fermita

Hejno, iom malsana, iris kun sia patrino al la familia kuracisto. Tio estis jam la *dua* fojo en tiu semajno, ĉar li ankoraŭ *ne* estis sana. (= li ankoraŭ *ne* estis *tute* re-sanigita).

«Nu, Hejno», diris la kuracisto, «vi jam aspektas *pli* sana, ol la *lastan* fojon.»

«Jes, sinjoro doktoro», diris Hejno, «mi *tre* zorge faris tion, kio estas *skribita* sur la *botelo* de la medikamento.»

«Ha, tiel do», diris la kuracisto; «diru al mi: *kio* estas skribita sur ĝi? »

«*Tenu* la botelon *bone* fermita!», eksplikis Hejno.

29. Li volis rigardi, sur kio ŝi sidas

Merkrede *matene*, la malgranda *Otto* faris viziton al sia onklino *Jutta*.

Kiam li en-iris, la onklino sidis en *komforta* fotelo kaj trikis *pulovron*.

«*Bon'tagon*, onklinjo», gaje ek-kriis Otto, «ĉu vi fartas *bone?* »

«Jes,mia kara nevo», diris la onklino, «ĉu vi kaj viaj gepatroj *ankaŭ* bon'fartas? »

«Jes, jes», respondis la knabeto, «*ĉiuj* estas en *bona* sano.»

Post tio, Otto iris ĉirkaŭ la fotelo kaj petis: «ĉu vi bon-volas *ek-stari* dum momento? Mi volus *rigardi* ion.»

La onklino, iom mirigite, *ekstaris*, kaj demandis: «*Kial* vi volis, ke mi ek-staru? ... *Kion* vi volas *rigardi?* »

«Hieraŭ», klarigis Otto, «mia patro diris, ke vi sidas sur *amaso* da mono!»



51. Ĉu oni fajfu, kiam iu ronkas?

En gastejo por *junuloj*, Benno kuŝis en la lito super *tiu* de sia kamarado Georg. Benno *ne* povis *dormi*, ĉar Georg *daŭre* ronkis.

Post *kelka* tempo, Benno ekpensis, ke por *mutigi* la ronkanton, li fajfu. Tial, Benno fajfis *akra*-sone, *ĉiu*-foje kiam Georg *re*-komencis «segi lignon». Kaj, *ĉiu*-foje, *tuj* ĉesis la ronkado de Georg.

Je la sekvanta *mateno*, kiam Georg *vekiĝis* kaj frotis siajn *okulojn*, Benno diris kun *riproĉa* tono: «Georg, vi *terure* ronkas, dum dormo.»

Tiam, Georg ĝemis: «Tio estas *nenio*, Benno, eĉ *malpli* ol nenio. *Vi*, dum la *tuta* nokto, vi daŭre *fajfis* kaj tial, malhelpis min *dormi*. »

recenzoj - recenzoj - recenzoj

Etaĵoj: ne bagatelaĵoj

Malnovaj rakontoj en Ikeda. Ilustr. 25x18 cm, 48 p. Eldonis: Esperanto Rondo en Ikeda, 1980.

Bunta kampo. Temas pri legendoj, fabeloj, kiuj ankoraŭ vivas precipe en rondo de la olduloj; interesaj, memorindaj lokoj: arbo, ponto, tombo, roko; vegetalo, pri animaloj, kiuj rekompencas la bonecon per bono; pri malnovaj personoj, bataloj, okazintaĵoj, pri origino de nomoj, pri festoj, popolkutimoj ktp.

Eble povas esti, ke por kelkaj tiuj estas sensignifaj, sed ni ne forgesu: etaĵoj ne estas bagatelaĵoj! La folkloro vivas nuntempe sian duan florepokon: savi, konservi ĉion, kion por la homa kulturo ankoraŭ oni povas savi; kaj lerni de la pasinto. Folkloro konigas al ni la lokon, kie ni naskiĝis, loĝas, vivas (ĉu ni vere konas ĝin?), nian ĉirkaŭaĵon, eĉ la naskolandon, kaj igas ilin amataj.

La aŭtoro de ĉi tiu libro estas kolektivo. Iu rakontis, iu desegnis, iu tradukis. (La nomoj estas indikitaj). Ĉiu rakonto havas du-tri tre interesajn, belajn ilustraĵojn. La kvardekjaran datrevenon festis Ikeda – kiel Urbo –, kiu kreskis sur malnovaj tradicioj, kaj heredas longan historion. Estis fondita Grupo kun 350 membroj por kolekti malnovajn rakontojn en Ikeda, antaŭ ol ili perdiĝus. (Diras la salutvortoj en la libro).

Grava celo estas, ke homoj konu la landon, kutimojn unu de la alia. Pro tio ni estas dankemaj al niaj japanaj samideanoj.

Julio *Varga*

Riĉa vortaro

Wörterbuch Deutsch-Esperanto, de Erich-Dieter Krause. Eldonis VEB Verlag Enzyklopädie, Leipzig, 1983. 19 cm, 596 p. Bindita. Prezo: 18 markoj.

Por germanlingvanoj delonge mankis moderna „meza" vortaro – pro malnoviĝo aŭ elĉerpiĝo de iam eldonitaj –, sed nun la publiko ricevis ampleksan, sescent-paĝan kaj eminente ellaboritan verkon, kiu evidente prezentos firman lingvan bazon al la esperantista movado en la koncernaj landoj. Sed ne nur tie. Precipe redaktoroj, verkistoj kaj esperantologoj ĉiagradaj utiligos ĝin kiel fidindan kaj freŝenhavan konsultlibron (eĉ kiam oni devos helpi sin per ia germana vortaro), ĉar ĝi estas sendube la plej granda inter tiaspecaj E-vortaroj. Ĝi liveras pli ol 40 mil titolvortojn, grandiozan stokon da parolturnoj, idiomaĵoj kaj esprimoj, do tian riĉon, kiu multrilate povas kontentigi eĉ altajn postulojn, ekzemple pro la granda elekteblo inter sinonimoj.

D-ro Krause kolektis el tre larĝa kaj (prefere) moderna lingva materialo, revuoj kaj faklibroj. La moderneco montriĝas bone en la solide elektita granda aro da fakaj vortoj, ankaŭ ĉe la utila selektado de arkaiĝintaj kaj jam ne konsilindaj terminoj. Oni rimarkas la sinretenon de la aŭtoro trudi proprajn arbitraĵojn, krei superfluajn neologismojn. Anstataŭ tio li ĝenerale kontentiĝas per ĉirkaŭskribo de la tradukenda nocio, tute prave; ja unuvorta E-ekvivalento (tiom dezirata de kelkaj vortaristoj) ne ĉiam estas trovebla. Kontraŭa al la ideo de la IL estas la penso misa, ke *ĉiu ajn* lokrilata, genta kaj simila nocio *nepre devus havi* radikvortan E-ekvivalenton, sendepende de tio, ĉu ĝi estas internacie konata aŭ ne. Ni vidis jam surprizajn ekzemplojn de malkonvenaj, superfluaj esperantigoj de ne *vaste konataj* mezepokaj oficoj, vestaĵoj, de folkloraj aĵoj, kaj oni povus ankoraŭ daŭrigi... Feliĉe, la modereco de Krause ne enlasis tiun specon de naciismo aŭ modosekvemo.

Bedaŭrinde *antaŭparolo* ne informas pri la vortaristaj principoj – precipe pri la riĉa vort-elekto – iom detale. Tion ne kompensis eldiroj de la aŭtoro dum la 68a UK, nek lia artikolo (Der Esperantist 1983/2.), kvankam la kvalitoj de la verko meritus pli da ekspliko. Tiu certe subtenus nefacilan redaktadon de aliaj komunlingvaj E-vortaroj, kiuj nepre utiligos ĉi tiun verkon.

Kvankam la Esperantajn tradukaĵojn prijuĝi apartenas pleje al germanlingvanoj, mi kuraĝas mencii, ke kelkaloke mi ne povis konsenti pri la legitaj; precipe se okazis kruda simpligo de germanaj esprimoj, kiuj ankaŭ en originala formo estas internacie kompreneblaj (ekz. „ne estas stultulo", anst. ne falis surkapen; per kapo volas tra la muro – tion anstataŭas verso, certe ne uzebla dum parolo aŭ teksto ktp.). Preseraroj tre malmultas; ĉu ankaŭ „pumpumi" (?) apartenas al tiuj ĉe „rumpeln"? Inter la prave malmultaj ne-germanaj *fremdvortoj* mi rimarkis „boŭlo" (A. bowling); lerta provo. Domaĝe troviĝas nenia signo pri grado de oficialeco, kaj (krom kelkaj aludoj: poezia, k.s.) nenio atentigas pri neologismo. Cetere ankaŭ pri tiuj vortoj la aŭtoro kondutis modele, prezentante nur plurloke uzitajn kaj jam akceptindajn.

Meritas laŭdon la klara presado, la bone eluzitaj paĝoj kaj la fortika bindado, kiuj multe kontribuas al la enhave eminenta uzebleco de tiu ĉi vortaro. Dankon pro la grandaj plenumoj de la aŭtoro kaj de la tiurilate sperta eldonejo.

Ervin *Fenyvesi*

Beleco ne sufiĉas

Bela revulo. (Fabelo pri birdeto.) Teksto de Geng Geng. Bildoj de Jiang Cheng'an kaj Wu Daisheng. Eldonis: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1983. 40 p. 21 cm. Prezo por Hungario: 45,- forintoj.

„Antaŭ longe estis birdeto, kiu tre fieris pro sia beleco" – komenciĝas la riĉe ilustrita, ĉarma fabelo. La bela birdeto tamen baldaŭ fariĝas malĝoja, ĉar la kunuloj komencas moki ĝin: „Ho, vi nur aspektas bela, sed kapablas fari nenion. Kion alportas al vi tiu beleco?" La birdeto tial decidas ellerni la flugadon – ĝi volus flugi tiel alte kaj bele, kiel la aglo. La sovaĝanseroj volonte konsentus instrui al ĝi la flugadon, sed la bela revema birdeto montriĝas ne sufiĉe persista – ĝi volus havi tujan sukceson,

sen ia ajn penado. Rezigninte pri la lernado de flugado, ĝi decidis ellerni naĝadon – sed ankaŭ por tio ĝi malhavis paciencon. Same okazis pri la kantado, kaj ankaŭ pri la kuracado de arboj, kiun la saĝa pego provis instrui al ĝi. Post tio la bela birdeto decidis tute ĉesigi la lernadon. Kaj baldaŭ venis vintro. La bela revema birdeto ne havis neston, ja ankaŭ la konstruado de nesto postulus penadon. La frosto preskaŭ mortigis ĝin, sed ĝiaj kunuloj informiĝis pri tio, kaj ili helpis al ĝi konstrui neston. La bela birdeto estis tre kortuŝita de la helpo, kaj ĝi promesis ellerni ĉion necesan.

La libron ilustras 38 tre bele pentritaj, multkoloraj bildoj – la teksto estas fakte la subskriboj de tiuj bildoj. Tre taŭga legaĵo por komencantaj esperantistoj, precipe por infanoj, sed ankaŭ spertaj legantoj de la Esperanta literaturo povas ĉerpi el ĝia legado freŝan plezuron.

V. *Benczik*

Esea rikolto

Gaston Waringhien: Kaj la ceter' – nur literaturo. Esperantologiaj Eseoj V. Eldonis: TK-Stafeto. Antverpeno–La Laguna. 1983. 350 p. 21 cm. Prezo por Hungario: 590,- forintoj.

La nomo de Gaston Waringhien por la intimaj konantoj de la Esperanta literaturo estas kvazaŭ sinonimo de la vorto „erudicio": liaj kvin eseaj volumoj certe estas inter la ĉefaj valoraĵoj de tiu ĝenro en la Internacia Lingvo. Indas ĉi tie birdokule revui ankaŭ la pli fruajn kvar volumojn.

La unua en la vico estis *Beletro I.*, aperinta en 1956 sur 232 paĝoj, kun originale fasonitaj eseoj pri universalaj literaturaj temoj (detektivromano, kompara literaturo ktp.) kaj kun serioze ĝisfundaj studoj pri la Esperanta literaturo. Ĝin sekvis *Lingvo kaj vivo*, aperinta en 1959 sur 450 paĝoj. Tiu ĉi dua volumo enhavis studojn pri la lingvo mem, opiniesprimon pri la tiam diskutataj aspektoj de la lingvoevoluo (pasivo, neologismoj ktp.). La tria esearo de Waringhien eliris en 1972 sub la titolo *Ni kaj ĝi*, sur 344 paĝoj. Tiu ĉi volumo enhavas eseojn pri temoj religiaj kaj artaj. Post ok jaroj, en 1980 aperis *1887 kaj la sekvo...*, dek ses eseoj sur 300 paĝoj. En tiu libro Waringhien pritraktis la historion kaj la estontecon de Esperanto, kaj ekzamenis la personecon de ĝia kreinto.

Kaj la kvina volumo (ĉerpanta sian titolon el poemo de Verlaine) *Kaj la ceter' – nur literaturo*, revenas al la temo de la unua volumo, al la beletro. La libro estas dividita je kvar sekcioj: *Pormemore, Popolkulture, Se babili butike* kaj *Vizite ĉe najbaroj.*

En la unua sekcio elstaras la intimtona rememoro pri la plurjardeka kunlaborado kun Kalocsay, el kiu kunlaborado naskiĝis nenombreble multaj valoraĵoj por la Esperanta literaturo. En tiu ĉi sekcio troviĝas ankaŭ la klasika studo, *La Budapeŝta Skolo*, en kiu Waringhien definitive difinas la lokon de tiu fama skolo en la Esperanta literaturhistorio.

La sekva sekcio sprite pritraktas interalie ankaŭ la Esperantan frazeologion. Mi ne povas kontraŭstari la tenton citi ĉi tie unu el la poemetoj, kiujn Waringhien verkis por sprite ilustri Esperantajn proverbojn:

Amikon havis ja Herkulo
kaj edzineton, kiu flirtis;
kaj la amiko sen skrupulo
kun lia edzinet' malvirtis.
Jen Herkulo ĝin rimarkis
kaj l' adultulon tuj pafarkis.

Ne ŝovu nazon en fremdan vazon.

En la tria sekcio la „butika babilado" turniĝas ĉirkaŭ temoj, kiel la tradukado, inkluzive pri la tradukplano de Zamenhof. Tre valora por nia literaturhistorio estas la studo *De unu antologio al alia*, en kiu Waringhien komparas la antologion *La liro de la esperantistoj* el la jaro 1893, kun *Esperanta Antologio*, aperinta en 1959.

La kvara sekcio pritraktas neesperantajn literaturajn temojn – oni povas legi pri Vergilio, Goethe, pri Hispanio en la spegulo de la franca teatro, pri poezio kaj vereco, pri la belga kaj bulgara literaturoj ktp.

Pli ol 1600 paĝoj – tiom estas nia ĝisnuna esea rikolto ĉe Waringhien. Mi skribas „ĝisnuna", malgraŭ tio, ke la aŭtoro insistas, ke *Kaj la ceter' – nur literaturo* estas la lasta en la vico. Tio estus bedaŭrinda, ja ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en naciaj lingvoj ege maloftas erudiciaj eseoj, kiuj parolas kompreneble ankaŭ al la malpli kleraj legantoj; eseoj, kiuj erudicion ne postulas de la legantoj, sed donas ĝin al ili. En la nomo de tiuj legantoj ni deziras al la 83-jara aŭtoro sufiĉan forton por almenaŭ unu plia volumo!

V. *Benczik*

Ĉiu vosto por sia celo

Vostokonkurso. (Fablo.) Teksto de Wang Zhenhua. Bildoj de Jiang Cheng'an kaj Wu Daisheng. Eldonis: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1983. 16 p. 21 cm. Prezo por Hungario: 20,- forintoj.

La arbaraj bestoj aranĝis vostokonkurson. Ĉefjuĝisto ili elektis la Elefanton, juĝisto la Maljunan Simion. Vice prezentis sian voston ĉiu besto: leporo, kanguruo, vulpo, hirundo, pego ktp. Unu havis mallongan vos-

ton, la alia longan, unu maldikan, la alia dikan, tamen la juĝisto Maljuna Simio venis al la konkludo, ke esence ĉiu vosto tute bone taŭgas por sia posedanto, do, ne eblas decidi, kiu estas la gajninto de la konkurso. Tio fakte signifas, ke ĉiu besto estis gajninto, ja ĉiu havis la plej adekvatan voston.

La saĝa didaktika enhavo, la simpla, konciza teksto, kaj ne laste la dek kvar tutpaĝaj ĉarmaj, kolorriĉaj desegnaĵoj faras tiun ĉi belan libreton aĉetinda por ĉiuj.

V. *Benczik*

Pli taŭga ol la latina

Oklingva nomaro de Eŭropaj birdoj. Red. D-ro Béla Mészáros. Eldonis: Landa Instanco de Medio- kaj Naturprotekto. Debrecen, 1980. 140 p. 38x20 cm. Multobl. Prezo: 9,- ned.gld.

Nuntempaj homoj jam ne multe konas nomojn de la ĉirkaŭ ni vivantaj, okulon-orelon ravantaj birdoj. Ne estas do facile interparoli pri ili: diversaj estas la nomoj eĉ enlande, kaj la sciencaj (latinaj) nomoj nur malmultajn konantojn helpas. La jena nomaro laŭ praktika maniero prezentes detalajn nomlistojn de 578 specioj kaj varioj, apud la latina en lingvoj Esperanto, angla, ĉeĥa, germana, hungara, pola kaj rusa. Temas pri la Eŭropaj birdoj, tamen la nomaro estas tutmonde utila, ja duono-triono de tiuj birdoj vivas ankaŭ en aliaj kontinentoj.

La E-ajn nomojn kompilis Ornitologia Rondo Esperantlingva (eldonis Esperanto Press, Kanado, 1971), kaj estas rimarkeble, ke ili ofte pli taŭgas ol la sciencaj terminoj. Tiuj ĉi ne ĉiam esprimas la karakterizajn trajtojn de la birdoj. Ankaŭ la familiojn pli klare aludas la E-aj nomoj, kiuj tute nature adapteblas al la parola lingvo. Oni povas aserti: pere de IL oni povas precize indiki la speciojn kaj variojn de la bestoj, pli perfekte ol la latineska fakidiomo. La jena *Oklingva nomaro* tion pruvas: fakuloj kaj naturamikoj povas multe profiti per ĝi.

Mankon de aliaj lingvoj – precipe de la latinidaj – bedaŭros uzantoj, eĉ se tion kaŭzis la limigita paĝonombro. Tiun mankon povos plimalpli kompensi „la plej belaspekta Ea faka revuo", la kvaronjara LA MEVO en artikoloj (eldonas ORE, Debrecen, Pf. 61, H-4010), ĝia internacia kunlaborantaro povos konvene kontribui tiucele. Laŭ mi tion postulas ankaŭ la akirita vasta faka prestiĝo de ORE ekster Esperantujo.

Ervin *Fenyvesi*

Grava propagandilo

Esperanto en la moderna mondo. Studoj kaj artikoloj pri lingvaj problemoj. Kompilis Rüdiger kaj Vilma Sindona Eichholz. Pliampleksigita dua eldono. 600 p. 21 cm. Bindita. Esperanto Press, Bailieboro, Ont. Kanada. Prezo: 25 US-dolaroj.

Jen klara kaj vasta informaro por kleruloj ne-esperantistoj, kompendia biblioteka manlibro, kies aspekto ekstera-interna jam impone impresas foliumantojn. Ĉar ĝi devas informi eksterulojn pri la titoltemo, la enhavo estas dulingva, angla, kaj iom malpli Ea, kelkfoje eĉ didaktike prezentante ĝin. Estas taŭga la vortaro-gramatika prezento de nia lingvo, aparte la fama letero al Borovko ŝajnas konvena por interesiĝantoj.

La kompilintoj dediĉis ampleksan parton al diversaj kapabloj de Eo, montri ĝian plenan maturecon por solvi taskojn de literatura kaj kultura komunikadoj inter la nacioj. Altvalora estas la studo de William *Auld:* „La IL kiel tradukilo por literaturo"; daŭre validas represoj de CED-dokumentoj, koncernantaj la temon – ili nepre meritas plian disvastiĝon ol kion ili havas! Kuraĝa kaj nekutima, do des pli interesoveka ŝajnas priskribo kaj propono de Vilma Sindona Eichholz pri justa bilingvismo por Kanado, kie vivas minoritatoj kiel „blankaj negruloj de Ameriko". Mankas loko por mencii ĉiujn seriozajn studojn: espereble ne mankos, kiuj konsultos ilin el inter ĵurnalistoj, politikistoj, internaciaj organizantoj k.a.

Ilustraĵoj kaj foto-represaĵoj estis abunde kaj lerte selektitaj el fakaj kaj aliaj vortaroj, libroj, reklamoj kaj periodaĵoj por pruvi laŭ okulfrapa maniero la modernan praktikan uzadon de Eo. Ankaŭ libroj de HEA, mem HV (intervjuo kun kosmonaŭto Bertalan Farkas) helpas la argumentadon de tiu plenzorge redaktita, bele presita kaj en bibliotekoj jam ne malhavebla libro.

Ervin *Fenyvesi*

POR LA ATENTO DE SOVETAJ ESPERANTISTOJ!

Laŭ oficiala informo, ricevita de la hungara libroeksporta firmao «KULTURA» fine de februaro estis transdonita al la reprezentanto de la samfaka soveta firmao «MEĴKNJIGA» stoko da listoj pri la Esperantaj libroj, eldonitaj en Hungario. Tiuj listoj enhavas la librotitolojn en Esperanto, kaj komentariojn en la rusa lingvo, tiamaniere do la gvidantoj de la librovendejoj povos facile orientiĝi en ili. La listojn «MEĴKNJIGA» dissendis al la librovendejoj «Druĵba» en la sekvaj urboj: Moskvo, Kievo, Leningrado, Tallinn, Riga, Jerevan, Harkov, Vladivostok. Esperantistoj en tiuj urboj do povas mendi hungarajn Esperantajn librojn en la nomitaj librovendejoj. La listo enhavas tiujn librojn, pri kiuj aperis priskriboj en la n-ro 1983/6 de HV, krom kelkaj intertempe elĉerpitaj: estas mendeblaj 57 titoloj.

GAJA PAĜO

Kompenso

Ŝtelisto nokte grimpas tra la fenestron de dentisto, sed – ve! – li trovas nenion ŝtelindan. La kuracisto vekiĝas, do la ŝtelisto postulas monon de li. Oscedante li respondas:
– Domaĝe, monon mi ne havas! Sed por ke vi ne foriru sensukcese, mi pretas eligi *vian denton senpage*...

Kata kanto

– Paĉjo, la kanario mankas el la kaĝo!
– Diable! Nun mi komprenas, kial kantis nia kato...

Ulo trista

– Mi volas telegramon sendi, sinjoro!
– Al kiu? – demandas la poŝtisto.
– Nu, tion mi ne scias. Ĉu vi povas rekomendi iun?

Ulo stranga

– Mi delonge skribis peton al la Poŝtdirektoro, sed li ne respondas. Strange!
– Kion vi ja petis?
– Alian poŝtan kodon: la nuna kodnumero tute ne plaĉas al mi.

Ulo nekredema

– Fileto, kiu sonorigis dum mi duŝis min?
– Nia najbaro, panjo. Mi diris, ke vi banas vin, sed li ne kredis. Tiam mi proponis al li enrigardi tra la ŝlosiltruo...
– Ho! kaj kion li faris?
– Nu, li enrigardis, kaj poste jam kredis min...

Antaŭen al la sano!

– Ekde nun – aŭskultu! – mi volas seriozan kaj sanan vivon vivi (ho, netransitiva verbo?!) – por abunde drinki ankoraŭ dum multaj jaroj!

Dum kongresa kvizo

– Kiuj 3 libroj estas la plej elstaraj en nia literaturo, samideano?
– Tri? Neeble! Ĝis nun eldoniĝis *nur du* el miaj verkoj!

Malsuka suk-ceso

– Ĵus aperis mia nova poemaro – fieras nia ne-tre-konata versfabrikanto. – Ĉiujn volumojn mi sukcesis urĝe-kapte aĉeti antaŭ la nazo de aliaj...

En la kongresa librejo

– Gratulon kara aŭtoro! Kvankam mi tute ne ŝatas la sencmankan literaturon, tamen viajn verkojn mi ĉiam aĉetas...

Tie ni aŭdis

– Eble ni konas unu la alian, ĉu? Mi jam vidis vin ie...
– Neeble! Mi neniam iras tien.

Dum petola karnavalo

– Kiel vi amuziĝis dum la maskobalo? – demandas amikino.
– Grandioze! Imagu, sep viroj proponis edzinigon! Iom tro, ĉu ne? Do mi akceptis tion nur de kvar uloj.

Post alia balo

– Trankviliĝu karulo – diras edzineto – mi kokris vin nur por pli profunde senti... ke neniu povas vin anstataŭi!

Sur la mira maro

– Ho kara kapitano – ĝemas virino pala pro marmalsano – ĉu dekstre videblas jam la tero?
– Ne, sinjorino, tio estas la horizonto.
– Aĥ, eĉ tio estas pli bonvena ol la akvo!

Vera amiko

– Mia edzino forlasis min, eĉ! kun Joĉjo, mia plej bona amiko!
– Sed laŭ mia scio, Joĉjo ne estis via bona amiko.
– Sed nun li iĝis tio!

Enviinda postulemo

Post ulemo postiris du amikoj, venintaj de familia solenaĵo.
– Kial vi ne volas amindumi al la bela Rozinjo? – demandas la unua. – Vi mem diris, ke ŝi iĝos eminenta edzino.
– Ĉar mi ne volas edziĝi. Kaj pri amikinoj mi metas *pli altajn* postulojn.

Funda kaŭzo hunda

– Mi adoras tiun virinon! Tamen mi ne povos edzinigi ŝin.
– Sed kial?
– Ĉar mia hundo kaj ŝia hundo tute ne simpatias inter si.

Amo unuavide

Amikinoj babilas:
– Ĉu vi kredas – demandas la unua – ke ekzistas amo je la unua vido?
– En la unua minuto certe ne – sonas la respondo. – Ĉar kiel eblas scii, kiom enspezas tiu viro?

Ĉu modesta novedzo?

– Ni aranĝos, kara, tute modestan geedziĝon, nur en eta rondo. Al mi malplaĉus, se mia edzino ekscius ion...

Aŭto rapidegas

tra vilaĝo. Policisto haltigas ŝin (aŭ lin; kial diskriminacii?).
– Sinjorino! (aŭ S-ro!) Ĉu vi ne legis la tabulon pri la permesita rapido?
– Ĉu legi? Dum tia rapideco?!

E.F.

HUNGAROCOOP
BUDAPEST

HUNGAROCOOP
H–1370 Budapest 5
P.O.B.334

HUNGAROCOOP
Kooperativa Entrepreno por Ekstera Komerco



El «Tutmonda Sonoro»

En la ĉefaj linioj de nia enigmo (H.1., V.17.) ni citas la epigramon „Admono" de la antikva greka poeto *Theognis.* Alsendu tiujn du versojn. *Limdato:* unu monato post la alveno de la revuo. Inter solvantoj ni lotumos premiojn.

Horizontale: 17. Franca imperiestro **18.** Metu en akvon por lavi **19.** Helena fablisto **21.** Marista distancmezuro (R) **23.** Objekto por imito **25.** Inter aliaj **26.** Pinta vergeto por pafarkoj **27.** Oficiala funkciulo rajtigita doni dokumentojn (R) **29.** Hungara industria urbo kun centralo, inverse: malviglec' de organoj **31.** Sennuba, hela **32.** Persona pronomo **33.** Akuta angulo de kurblinioj (R) **35.** Konjunkcio **37.** Forte deziri ion mankantan **38.** Malmodeste postuli **40.** Kiel 32.H. **41.** ITŜ **43.** Intermonto **44.** Adverbo **45.** Vivmaniero kaj konduto (R) **47.** Konjunkcio por komparativo **48.** Marĉa praarbaro **50.** SOT **51.** Delikata suba plumaro ĉe birdoj (R) **53.** Asocio, ligo **54.** Samaspektaj **56.** Eltiri lakton el mamoj (R) **58.** Organisma **59.** Ekfumus cigaredon **60.** Biblia manĝaĵo **61.** Faros iun nedifinitan agon **62.** Ĉ. tridek tagojn **63.** Malĝojo pro ies morto (R) **64.** Halogenan elementon **66.** Tion plenumas faktoroj (R) **67.** Eroj de manĝaĵo **68.** Prefikso **70.** En tiu ĉi momento **71.** Konifera arb' **72.** Ne tuto (R) **73.** Movi vin! **74.** Ne resti **76.** Havi inter si ligitecon (R) **78.** Malebligis en- aŭ eliron **79.** Siberia riverego **80.** Buŝa ost' **82.** Monatero (R) **83.** Translokigos ion **85.** Surpaperigos la precizan tagon **87.** Opia medikamento, narkotaĵo (R) **88.** Tolaĵon rigidigas (R) **90.** Natrio **92.** Grupo, kun samaj politikaj celoj **94.** - 599 - per romiaj ciferoj **95.** Kore ŝatata **96.** Faris kavon en io **98.** Malsobra (R) **100.** Interparolas.

Vertikale: 2. Apartenanta al dezerta ripozejo **3.** Subteni kaj firmigi **4.** Ago por ridindigi iun **5.** Instrumento **6.** Konjunkcio **7.** Kava svingebla son-instrumento **8.** Vegetaĵo de helkoloraj floroj kun kvarfolia kaliko **9.** Notu bone! **10.** ...-lio: ero de la socio **11.** Interno **12.** Ilo por sin amuzi **13.** Tute fermita ĉambreto **14.** Senkolora gaso, en la aero **15.** Interjekcio **16.** Narkotaĵ' el papavo (R) **22.** Nord-Eŭropa lando (R) **24.** Sekretaj, misteraj **27.** Lando inter Hindio kaj Tibeto **28.** Radiumo **30.** Fari ion **31.** Malmilda **32.** Kun p: frukto **34.** La Internacia Lingvo **36.** Reen: triono de jarsezono **38.** Aparta skribaĵo en gazeto (R) **39.** Nedifinitan pronomon **42.** Kuntorditaj fadenaj ligiloj **44.** Manĝeblan ruĝan legomon **46.** En lingvo de Orient-Eŭropa lando **49.** Sur rompita membro aplikas kuracisto **50.** Homo tro amanta plezuran vivon (R) **52.** Naskigi idon **54.** Normala stato de korpo (R) **55.** Satelit' de l' Tero (R) **57.** Ago ĝenerale por produkti **59.** Muzika son' **60.** Fikse kunmetis la diversajn partojn **62.** Rivera kanon-ŝipo (R) **63.** Luitan bienon **65.** Malmola (R) **67.** Adjektiva form' de verboj **69.** Entomologia Rondo Esperanta **71.** Kvitigi ŝuldon (R) **72.** Mallojale trompante ies fidon **75.** Meritplena sufikso **77.** Malunue **78.** Usona aŭtofabriko **81.** Teksaĵo sur muro aŭ planko (R) **83.** Prepozicio **84.** Nereala, elpensita **86.** Trinkvazo **87.** Per dentoj dispecigi (R) **88.** Sekse ami (R) **89.** Malgrandan **91.** Vegetaĵ' **93.** IBU **95.** Flanka ekstremo **97.** Identaj vokaloj **99.** En necerta loko **101.** Prepozicio.

Solvo de la krucenigmo en n-ro 1983/5:

Iam oni en milito / al principoj sin ne tenis,
de l' feblulo la pli forta / kion preni povis, prenis.
Nun alie jam/ La mondon // konferenco reglamentas.
Se l' fortul' misaĵon faras, / ĝi kunsidas – kaj konsentas.

(János *Arany,* tr. *Kalocsay*)

Premion gajnis per lotumado: *Abuladze,* A.A., Tbilisi, Kartvelio, SU; s-ino *Bárkányi* Istvánné, Kiskunhalas, H; s-ino *Nica* Olga, Bukureŝto, R.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

Iluzioj

Noveloj de Lorjak

Jen, kelkaj vortoj pri Lorjak: li estas eble la ĉefa stelo de la Esperanta poramuza prozo. Liaj originalaj noveloj enhavas interesajn temojn, freŝan humuron kaj delikatecon.

1. Kio estas la antaŭnomo de la japana virino en la novelo „Iluzioj"?

2. Kian profesion havas sinjoro Honoré Pion en la novelo „Paf'"?

3. Kiu novelo estas inspirita de la fama franca aktoro Jean Gabin?

Limdato por la respondoj: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvoj de la demandoj en la n-ro 1983/5:

1. Marja Bulski estas polino. 2. Ŝia patro laboras en Kamĉatko, en orminejo. 3. La ĉina knabo Iĉio Pang ne povas bone prononci la literon „r".

Libropremion gajnis: s-ino *Kassai* Aladárné, Sátoraljaújhely, H; Otto *Slatinsky,* Košice, CS. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

Korespondi deziras

Grupo de dek gejunuloj (20-25 j.) ktm, pĉt, nepre respondas. Al adreso de gvidanto *Ŝelistov* Sergej, *Krasnodar,* Tramvajnaja 14, SU-350 021. – Matematikisto (26) en komputilcentro int. pri foto, lingvoj, kol. bk ktm; Peeter *Trusti, Rakvere* pk. 9, Estonio, SU-202 100. – S-ro Kimmo *Hakala,* kun eksperiment-bredistoj k.a. *Helsinki,* Hämeentie 70 A/8, SF-00550. – Milan Petkov *Kamburov* (30) kun socialismaj landoj. *Jambol,* str. gen. Zaimov 8, A/6, BG-8600. – Dimo *Trudoljubov* (60) ĵurnalisto, *Jambol* str. Al. Stamboliski 65, ap.13. BG-8600. – S-ro Uwe *Heidrich* (39) pri historio, kulturo, kol. bk, pm. *Dessau,* Augustenstr. 8, DDR-4500. – Prof-ino de muziko, Marlene *Lewandowska* (20) pri kulturaj temoj, *Rumia* ul. Kujawska 15/37, PL-84-230. – *Takács* István (26) e-isto-nudisto, sen malutilaj pasioj, edzinigus simile opiniantan hungarinon. *Marcali* Katona J.u.4. H-8700. – Grazyna *Madej* (20) ktm, pĉt. *Wierzchowisko,* (Katowice) 121, PL-32-355. – *Kudravcev* Viktor (26) interŝ. bk, ktm, pĉt. *Nifnevartovsk* Tajoĵnaja 32, SU-626.440. – Galina *Tiĥonova* (16) ktm, *Velinodvorskij* ul. 8 Marta 16. SU-601.590. – Stanislav *Debski* (20) kun gejunuloj pĉt, ktm, *Rózyca* str. Glowna 55, PL-97-122. – Studento *Grigorjev* Andreo (20) pri turismo, arkitekturo, moderna formigo, kol. bk, amikan rilaton. *Krasnojarsk* str. Komunalnaja 15-59. – Studentinoj Elena kaj Sveta *Jalagan* (21, 19) pri muziko, pentroarto, kol. pm, bk. *Krasnojarsk* Metalurgov 30-311. – Lernanto Hagen *Schnauss* (14) kun geknaboj ktm, pri libroj, interŝ. pm, bk. *Warin* Pf.9. DDR-2723. –

Agronomo Leonid *Senj* (35) kor. kaj interŝ. kolor-bk kun hobiuloj ktm, *Vel. Tirnovo* Pk.16, BG-5000. – Marina G. *Todorova* (36) ktm, *Jambol,* ĵk Dramov 20. E/120. BG-8600. – Jordan T. *Jordanov* (40) pĉt. *Jambol,* ĵk. Ignatiev 76. D/112, BG-8600. – Elena I. *Mitakova* (26), str. Georgiev 30. BG-8600. – Andrej *Achmirowicz,* komencanto, pri muziko, turismo, libroj, sporto, teatro, ŝako, kun amikoj ankaŭ angle, ruse. *Pruszkov* ul. Powstańców 101/23, PL-05-800. – Ulrike *Hanslik* (17) pri muziko, sporto, desegnas, *Schőneck* Roter Muldenweg 36, psf 11-09, DDR-9655. – Janette *Helbig* (18) pri lingvoj, literaturo, muziko, humuro, *Klingenthal,* str. der DSF 19, DDR-9650. – Svetlin J. *Stojanov* (18) lernanto, pĉt. ktm, *Jambol* str. Srem 7/A, BG-8600. – Instruistino *Tatjeva* Ludmila (26) pĉt, Vorošilovgrad, kv. Ŝevĉenko, 63-26, Ukrainio, SU-348.031. – S-ro *Uzklingis* Arnis (24) kun geesp.istoj, interŝ. bk, diskoj, ilustr. libroj. *Pikavere* str. Salu, Estonio, SU-203.041. – Studentino *Sergijenko* Tatjana (19) ktm, pĉt. *Krasnojarsk,* ul. Zabobonova 8-115, SU-660. 062. – S-ro Gintaras *Žiaunys* (18), ktm, pri filat., muziko, E-movado, interŝ. pm, bk, diskoj k.a. *Mažeikiai,* Žemuitijos 9-25, Litovio, SU-235.500. – Studentino Jelena *Strojkova* (21) ktm, pĉt, kol. E-aĵoj, bk de urboj, aviadilo-modeloj, fotoj, etkalendaroj. *Kiev,* Bogomolca 7/14-18. SU-252.024. – Geedzoj *Paraškevov,* Dimitar kaj Liljana, junuloj, ktm, kun junaj geedzoj. *Jambol* str. Kabile 40/A. ap.4. BG-8600. – Pri junularaj aferoj, studentino Zoja *Carjova* (20), *Krasnojarsk,* a/k 6050, SU-660 113. – Kursanoj (20-70 j.) kun ges-anoj pĉt, nepre respondas. Al adreso: Esperantistôw Kolo, *Inowroclaw* ul. Solankowa 77, PL-88-100. – E-Klubo PROSPERO dez. interŝ. diskojn, kasetojn je E-aj. S-ro *Čibanov* A.L., *Bol. Muraškino,* ul. Svobodi 126. SU-606.330.

Leterkesto

Ester Keil, Nurnberg, FRG: La E-klubo, kies prezidantino vi estas, *fondiĝis antaŭ 95 jaroj,* kiel la unua en la mondo! Ne miru do, ke ni iom emocie legis vian amikan informon pri la jubilea festeno de la klubo. Akceptu ankaŭ tie ĉi varmajn gratulojn de nia redakcio, mi deziras al la plej malnova E-klubo sukcese daŭrigi la grandajn tradiciojn. Ni ne forgesas, ke via klubo aperigis en 1889 nian „praulon", la unuan E-gazeton: LA ESPERANTISTO. – Por salutojn sendi el la tuta mondo, jen la adreso: Esperanto-Klubo, Pirockheimerstr. 11, Nurnberg-10, D-8500.

Adolf Staňura, Havířov, CS: Ni konsentas, ke *teorie* estas pli ĝuste diri „ŝi *nomatas* Ilonjo", ol „ŝi *nomiĝas*". Certe, ŝi ne nun iĝas nomhava, kiel ekz. flamiĝi aŭ formiĝi – iĝas flama, formhava. La esceptan uzon de *nomiĝi* (esti nomhava) la praktiko jam sankciis, pro malĝusta „pasivigo" laŭ nacilingvaj analogioj. Ja, lingvo estas fenomeno *„ankaŭ psika,* ĝi ne nur kaj ne ĉiam kondutas laŭ la logiko. Cetere ambaŭ supraj formoj uzeblas en prezenco eĉ de avinjo longa post la iama nomdono; ekz. la esprimon „tiel nomataj klasikaĵoj" vi certe ne ŝanĝos al „tiel nomitaj" (Escepte se ili perdis la menciitan econ). Varman saluton!

Josef Cremer, Glesch, FRG: Redaktado iĝas – kredu – multe pli agrabla (facila ĝi ja neniam estas), se oni ricevas prijuĝojn kaj opiniojn de la abonantoj, eĉ se nur skize. Kontente ni legis pri viaj interesoj al la artikoloj pri hidroteknika, medioprotektado, pri alispecaj teknikaĵoj. La faka lingvaĵo ankoraŭ restas „cindrulino" en nia gazetaro, kaj el tio devenas niaj devoj tiurilate; feliĉe eĉ la kelkaj oponantoj akceptas tion ĝenerale. Al la kontraŭa „segmento" apartenas la humuro en nia „Gaja Paĝo", kiu ankaŭ plaĉas al vi (kaj al multaj), espereble ankaŭ estonte. Eĉ tiam, se la humuraj *informoj* de la desegnoj (foje la in-formoj) trovis malplaĉon ĉe du-tri tro seriozaj legantoj. Tre bonvena kontakto kun la legantaro montriĝis la *solvoj* de la enigmoj, kies plurobliĝo ĝojigas la redakcion; kun tiuj ofte venas ankaŭ trafaj rimarkoj en diversaj temoj.

Anatolij Surnakin, Moskvo, SU: Kun intereso ni legis la konata poemo de *Julio Baghy:* „Ĉe malnova samovaro" en via „modernigo". Post duonjarcento la tristaj sentoj de la apudsidintaj „ruso kaj hungaro" jam – feliĉe – ŝanĝiĝis multe, kaj tial via „modernigo" en tiu direkto estis kontentiga; dankon pro la sendaĵo!

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO + Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** + Arta redaktoro: **Eszter Kiss.** + Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Ģeorgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits.** + Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfons Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** + Budapest, ĵpk. 193. H-1368. Telefono: 141-078, 334-194. + Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. + Respondeca eldonisto: **Tibor Vaskó.** + Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215-96-162, 1900 Budapest, Józsefnádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. + Abonprezo por jaro (ses numeroj) 78,- Ft, al eksterlando por unu jaro 96,- forintoj. + Peranto al eksterlando KULTURA (Budapest, P.O.B. 149, H-1389.) Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11.- dolaroj Usonaj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. + Presejo de

Indexszám: 25 377 ISSN 0018-7704

BILDKVALITO EN SUPERA GRADO!

CTV 1556 MÓR

KOLORA TELEVIDILO

* Moderna formo, variaj kestokoloroj (nigra, kverkokolora, juglanduj–kolora, antracitkolora)
* Fortluma, energiosŝpara 110°-a IN-LINE bildotubo kun ekrano de diametro de 56 cm
* Per infraruĝa teledirektado eblas programi ok staciojn
* Ŝparema energiokonsumado
* Aŭtomata ricevo de elsendoj OIRT-CCIR kaj SECAM-PAL
* Alkonekteblas kapaŭdilo, magnetofono kaj vidmagnetofono
* Garantia tempo: 3 jaroj

ORION
RÁDIÓ ÉS VILLAMOSSÁGI VÁLLALAT
1106 Budapest
X., Jászberényi út 29.
Telefon: 284-850, 484-760

TEKNIKAJ DATOJ:

Energiokonsumado:	100 W
Ricevkapablo:	kanaloj VHF 1-12 kanaloj UHF 21-60 OIRT-CCIR PAL-SECAM
Anteno:	75 Ohm asimetria komuna VHF-UHF
Voĉo:	2 W
Dimensioj	690x465x440
Teledirektaj ebloj:	8 programoj (la 8a: videomagnetofono) lumforto kolorkontrasto voĉforto ideala stato malŝalto
Maso:	30 kg





Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

BÁV

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

Konsumturist



en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.
V. Duna Intercontinentál